

EL POPOLA ĈINIO

Venke apartenas
al la pacamaj
popoloj tra la
tuta mondo

de Cai Ĝen-hŭa

Aŭg.
1953



La Triumfo de Intertraktado

—Raporto pri la subskribo de la Korea Armistiko laŭ propraokula vidaĵo—

Nia Speciala Korespondanto

Tra la verda monto-ĉirkaŭata valo, la glata aŭtovojo kondukas en du direktojn: norden al Kaesong, estrejo de la delegacio reprezentanta la Korean Popolan Armeon kaj la Ĉinajn Popolajn Volontulojn kaj suden al Munsan, bazo de la usonanoj kiuj sin maskas sub la flago de la Unuigitaj Nacioj. Inter tiuj ĉi du punktoj estas la loko de la armistika intertraktado, tend-punktitita cirklo kun radio de 1,000 jardoj. En la tago, grandaj bar-balonoj flosantaj en la ĉielo markas ĝiajn limojn. Tra la tuta nokto perpendikla radio de serĉlumo staras ĉi tie kiel signalo de imuneco kontraŭ milita atako. Tio estas Panmunjom, la loko al kiu la okuloj de la mondo sin turnas hodiaŭ—la tago de la subskribo de la korea armistiko.

Tuj apude staras la monto Cungaksan, la loko kie la Usona marioneto Singman Rhee komencis ĉi tiun raban militon. Nun, kiam la forto de la popoloj jam montris la bankroton militan, politikan kaj moralan de Rhee kaj liaj mastroj, la milito virtuale finiĝas kie ĝi komenciĝis.

Kiam Generalo Nam Il, gvidanto de la korea-ĉina delegacio, veturas de Kaesong al Panmunjom, li estas akklamata de ĝojegaj koreoj. Kvankam la civitanoj de Kaesong kaj la tujapudvoja regiono ne estis en la efektiva regiono de militaj operacioj de kiam la intertraktado komenciĝis, ili, kiel ĉiuj aliaj popoloj de ĉi tiu lando, scias kion milito signifas. Multaj iam tenis en siaj brakoj siajn proprajn infanojn, brulmortigitaj per napalmo (gasolenbombo); multaj iam aŭdis la lastajn kriojn de siaj karuloj, bombitaj el la aero, kuŝantaj en sia propra sango. En la lastaj du jaroj, ĉi tiuj popoloj ankaŭ vidis ripetitajn Usonajn provokojn super la nemilita zono mem, provokojn kiuj forprenis vivojn. Ili vidis siajn armisticajn delegitojn persistantaj en paco-serĉado malgraŭ malhonestaj Usonaj manovroj por pereigi la intertraktadon, malgraŭ perdidaj Usonaj provoj por asasinigi ĉi tiujn delegitojn el la aero interne de la regiono kie ambaŭ flankoj konsentis konduki neniam militan operacion. Kiam ili krias *mansej* (t.e., 'vivu' en la korea lingvo) pro la Korea Popola Armeo, pro la Ĉinaj Popolaj Volontuloj, ili akلامas homojn kiuj estas venkintoj en la peniga kaj malfacila batalo por paco.

Kio okazas sur la alia flanko en ĉi tiu momento? Tie, eĉ la celebron de armistiko oni malpermesas. Singman Rhee, kiu vivas de la sango de sia propra popolo, ne trovas ĝin okazo por ĝojado. Generalo Taylor, komandanto de la Usona Oka Armeo, publikigis malbonhumoran ordonon malpermesi siajn trupojn celebri "sen venko." Ne gravas. Nenio povas malhelpi ordinarajn homojn akلامي la ĉesigon de buĉado. Kiel ni sciiĝas poste, la momento de armistiko estas salutata per krioj de ĝojo inter la loĝantaro de Suda Koreio kaj de la ordinaraj soldatoj de multaj landoj, inkluzive Usonon, kiuj estas devigitaj aŭ trompitaj en la bataladon por malpura celo. La minacoj de iliaj superaj oficiroj ne povas damaĝi la ĝojon de la soldatoj, aŭ ilian aŭrorantan esperon ke nun ili povas hejmen iri.

Ni eniras la konferenco-regionon per aŭto. Krom la delegacioj, estas senprecedenca kolekto da ĵurnalistoj el ĉiuj landoj de la mondo. Ankaŭ ĉi tie estas kontrasto. La Usonaj kaj aliaj korespondantoj de la monopoligita gazetaro, venintaj el Munsan, portas militajn uniformojn. Eĉ la raportado de la armistiko estas libera nur al raportantoj akredititaj kiel milit-korespondantoj al la komando de la "Unuigitaj Nacioj" (t.e. Usono), kaj tial sub milita kontrolo. La gazetaraj reprezentantoj kiuj alvenas de Kaesong inkluzivas ne nur koreojn kaj ĉinojn kaj verkistojn el Sovetunio kaj la popolaj demokratioj. Inter ili ankaŭ estas homoj raportantaj por demokratia ĵurnaloj en Britio, Francio, Aŭstralio, Aŭstrio, Kanado kaj Usono. Ĉiuj estas en ordinaraj civilaj vestoj. Ili ne estas milit-korespondantoj sed pac-korespondantoj. Kiam la raportantoj de la du flankoj renkontiĝas, estas rimarkite ke Usona milita polico gravitas al la apudeco de la konversaciantoj kaj provas forpuŝi la korespondantoj de la "Unuigitaj Nacioj."

Nova vidaĵo en la konferenca regiono estas milita personaro de la "Unuigitaj Nacioj" en uniformoj aliaj ol Usonaj. Kvankam la popoloj de aliaj landoj ofte demandis kial la usonanoj devas intertrakti ankaŭ por iliaj fortoj, tamen iliaj reprezentantoj neniam antaŭe estis vidataj en Panmunjom. Nun ili ĉeestas nur kiel rigardantoj kaj—ankaŭ por la unua fojo, kiel gardistoj ĉirkaŭ la subskriba halo. Sed kiel gardistoj ĉi tiuj britaj kaj Aŭstraliaj soldatoj estas sub la komando de Usona suba oficiro. Usono ne havas aliancantojn en ĉi tiu milito, nur subulojn.

Nun estas preskaŭ la deka horo. La delegacioj de la du flankoj envenigas por marŝi en la belan lignan halon konstruitan por la okazo. en rekorda tempo, de la Korea Popola Armeo kaj la Ĉinaj Popolaj Volontuloj. Komence, la konstruantoj dekoris ĉi tiun konstruaĵon per kolomboj de paco, sed la usonanoj kontraŭis al ĉi tiu "subfosa" dekorado kaj rifuzis eniri se ĝi restis. Ili ŝajnis timi pacon eĉ en simbolo kiun la homaro elektis antaŭ multaj jarcentoj.

Tra la okcidenta pordo, gvidante sian anaron, venas la korea Generalo Nam Il, la gvidanto de la Korea-ĉina delegacio. Li sidigas trankvile eĉ la tablo en unu flanko de la vasta halo, portanta malgrandan silkan flagon de la Korea Demokrata Popola Respubliko. La aliaj okupas vicon da seĝoj kiuj staras perpendikle al la tablo. Homoj de demokratiaj gazetaro, kinematografistoj kaj fotografistoj de la tuta mondo prenas poziciojn kontraŭ Generalo Nam Il. Sur ĉi tiu flanko de la halo, ĉiu komprenas la grandan venkon gajnitan por paco, venkon kiu devas esti firmigata per vigilanco kaj decidemo.

La Usona generalo Harrison eniras de la oriento. Li sidigas eĉ tablo kun la flago de la Unuigitaj Nacioj, ŝtelita de la Usonaj regantoj kaj malhonorigita ĉi tie en Koreio per tio ke ĝi fariĝis la standardo de invado kaj verŝado de sango de la popolo. Jen estas nova rolo por Wall-strata generalo. Reprezentanto de la fan-

(daŭrigo de p. 184)

Transiro de Uĝjang-rivero

—Epizodo pri la Longa Marŝo de la Ĉina Ruĝa Armeo—

Ĉjoŭ Ĉun

La unua revolucia enlanda milito en Ĉinio (1924-27) finiĝis per malsukceso pro la perfido de Ĉiang Kaj-ŝek. Post tio, la Komunista Partio de Ĉinio, gvidante la ĉinan popolon organizis multajn armitajn leviĝojn kaj fondis la Ĉinan Laboristan kaj Kamparanan Ruĝan Armeon (la antaŭa memo de la Popola Liberiga Armeo). Tiel komenciĝis la dua revolucia enlanda milito (1927-36) en kiu armita revolucio kontraŭbatalis armitan kontraŭrevolucion. En 1930 la Ruĝa Armeo gvidata de Maŭ Ze-tung jam pligrandiĝis ĝis 60,000 armeanoj kaj baldaŭ poste ĝia forto pligrandiĝis per la aliĝo de 40,000 anoj. Centra bazo estis establita en Kiangsi-provinco kaj multaj aliaj estis starigitaj aliloke.

Ĉiang Kaj-ŝek, la reakcia reganto, treege ĉagreniĝis pro la kresko de la Ruĝa Armeo. Ignorante la armitan invadon de la japanaj imperiistoj kontraŭ Ĉinio, kiu komenciĝis la 18an de septembro, 1931, li faris kelkajn grandskalajn sieĝ-atakajn kampanjojn kontraŭ la Ruĝa Armeo. Dank' al la strategio de Maŭ Ze-tung, kvar el tiuj atakoj estis disbatitaj unu post alia, inter la fino de 1930 kaj februaro, 1933. Tiam la Ruĝa Armeo jam pligrandiĝis ĝis 300,000 anoj, kun la rezulto ke la revoluciaj bazoj tra la lando, inkluzive de la centra bazo en Kiangsi-provinco, estis ankoraŭ pli fortigitaj kaj vastigitaj.

En oktobro, 1933, Ĉiang Kaj-ŝek okazigis la kvinan sieĝatakon kontraŭ la Ruĝa Armeo, per miliono da armeanoj. Tiun ĉi fojon la Ruĝa Armeo ne sukcesis frakasi la malamikan sieĝon pro tute erara taktiko de nura defensivo, kaj ankaŭ pro eraraj politikoj flanke de la Centra Komitato de la Partio kiu tiam estis superregata de la "maldekstraj" oportunistoj kaj ekskluzivis Maŭ Ze-tung-on en la gvidado. Por konservi sian ĉefan forton kaj kontraŭbatali la japanan invadantaron en la nordo, la Centra Ruĝa Armeo sin retiris el sia bazo en Kiangsi-provinco en oktobro, 1934. Tiel komenciĝis la epopea 25,000-li-a Longa Marŝo kiu kaptis la atenton de la tuta mondo.

Dum la Longa Marŝo, la Centra Komitato de la Partio daŭre faris multajn erarojn en militaj aferoj. Maŭ Ze-tung, kune kun multaj aliaj, kondukis firman lukton por korekta politiko kaj efektivigis la kunvokon de pligrandigita konferenco de la Politika Buroo de la Centra Komitato ĉe Zunĵi, Kuejĉoŭ-provinco. La konferenco forigis la "maldekstrajn" oportunistojn el la gvidado, kaj establis la gvidadon de Maŭ Ze-tung, en la tuta Partio.

La Centra Ruĝa Armeo, gvidata de Maŭ Ze-tung, frakasis poste multajn embuskojn fare de Ĉiang Kaj-ŝek kaj venkis la trupojn kiuj sekvis ilin en proksima persekuto. Ili konkeris naturajn barojn, transiris neĝo-kovritajn montojn kaj senhomajn marĉojn kaj finfine atingis la Ŝensi-Kansu-Ningŝia-limregionon, la revolucion bazon en Nordokcidenta Ĉinio, en oktobro, 1935. Aliaj ruĝarmeaj unuoj baldaŭ kuniĝis tie kun sia ĉefa forto. La venko akrita de la Ruĝa Armeo en la Longa Marŝo ebligis ĉinan revolucion transpasi la malfacilojn tiutempajn.

—La Redakcio

Post kiam la decido foriri al la nordo estis farita, la Ĉina Laborista kaj Kamparana Ruĝa Armeo komencis la evakuon de la baza regiono en Kiangsi-provinco. En serio da akraj bataloj la ringo formita de la Kuomintangaj trupoj ĉirkaŭ ni estis frakasita kaj la Ruĝa Armeo sin liberigis el la ĉirkaŭado.

Komenciĝis la Longa Marŝo.

La vojo de la Ruĝa Armeo kuŝis sur la granda Uling-montaro ĉe la limo de Kiangsi- kaj Kuangtung-provincoj, kaj trans la fama Ŝĵiang-rivero en Hunan-provinco. La peniga kaj danĝera vojaĝo estis farata ofte en noktoj peĉonigraj. Estis aŭtuno, la pluva sezono. La seninterrompa pluvado aldonis malfacilaĵojn al la armeanoj.



Perforta Transiro de Ĝinŝa-rivero
(Olepentraĵo pri epizodo el la Longa Marŝo)

de Ĝang Jang-ŝi
Ĝuang Zi-man

Belaj Libroj el Popola Ĉinio



La Feliĉo , 150-paĝa kolekto de noveloj.	1 ŝ. 6 p.
Por Nova Afero, Nova Maniero , 196-paĝa kolekto de noveloj.	1 ŝ. 6 p.
La Plej Forta Voĉo de la Paco , 56-paĝa kolekto de poemoj.	6 p.
Sovaga Herbaro , 65-paĝa poezio en prozo de Lu Sin, la plej eminenta ĉina verkisto.	1 ŝ. 6 p.
Fajrolumo en la Fronto , 148-paĝa novelo, kiu figure klarigas kial kiel venkis la ĉina popolo en la liberiga milito.	3 ŝ.
Plena Vortaro Esperanta-Ĉina , 936 p., tol. bind., la plej kompleta en sia speco.	12 ŝ.
Jarkolekto 1950 de El Popola Ĉinio (kajero)	2 ŝ.
Jarkolekto 1951 de El Popola Ĉinio (kajero)	3 ŝ.
Jarkolekto 1952 de El Popola Ĉinio (tol. bind.) (kajero)	7 ŝ. 6 p. 6 ŝ.
La prezoj inkluzivas la afrankon. Mendu ĉe nia administracio aŭ perantoj	

En la jarfina vespero de 1934, pli ol du monatoj post la foriro de la malnova bazo, la avangarda unuo —la Kvara Regimento—alvenis al la urbeto Ĝjangĝjeĥo en Kuejĉou-provinco. Antaŭ ĝi, barante la vojon antaŭen, kuŝis la rapide fluanta kaj danĝera Uĝjan-rivero.

La urbeto estas sur la suda bordo. La rivero estas 300 metrojn larĝa kaj fluas je rapideco de du metroj po sekundo. Rokoj submergitaj sub la surfaco de la rivero pliiĝas ĝiajn danĝerojn. Ĉe ambaŭ bordoj altas ĉielskrapaj krutegaĵoj; tiel altaj estas ĉi tiuj mont-muroj ke ili elbaras de la rivero tuttage la sunlumon.

Ĉe ambaŭ bordoj, kruta kvin kilometrojn longa vojeto zigzagas al la transirejo. Krom tiu mallarĝa vojeto, troviĝas neniu alia vojo por atingi la riveron.

Transe sur la norda bordo, tri regimentoj de la Kuomintangaj trupoj jam konstruis fortikan defendejon. La nuraj du pramoj jam estis tiritaj al la norda bordo

kaj subakvigita. Malantaŭe de la Ruĝa Armeo, pliaj Kuomintangaj trupoj venas en arda postkuro. Por ke la armeo ne pereu, nia avangardo devis transiri la riveron kaj disbati la malamikon sur la norda bordo, spite al la ekstrema malvarmo kaj ĉiaj malfacilaĵoj. Transiru la riveron! Rapide transiru la riveron! Jen estis la plej urĝa tasko de la momento.

Sapeistoj de la Kvara Regimento tuj komencis fari bambuflosojn en preparado de perforta transiro kaj pontokonstruo. Dek kelkaj lertaj naĝantoj estis elektitaj por transnaĝi la riveron. Ili devis forigi la gardostarantojn sur la alia bordo kaj ŝirmi niajn antaŭen irantajn unuojn dum la transiro.

La transiro komenciĝis en la vespero. La ĉielo estis mallume kovrita de nuboj. Pluvetas. Blovas jen kaj jen vento malvarma. La naĝantoj sin senvestigis kaj ĵetis, ĉiu kun revolvero sur dorso, en la glacian akvon sub la ŝirmo de intensa pafado de siaj kamaradoj kaj estis englutitaj de la malluma nokto.

La kamaradoj sur la suda bordo maltrankvile atendis la signalon de surteriĝo. Forte premate de nia peza protekta pafado, la soldatoj de la Kuomintangaj trupoj ne povis levi sian kapon kaj nur sencele pafis al la rivero. Post dek minutoj da peniga naĝado kontraŭ la tumultaj ondoj, la anoj de la Ruĝa Armeo surteriĝis sur la nordan bordon. Sed la fluo estis tro rapida kaj la ŝnuroj por konstrui ponton ne povis esti tirataj al la kontraŭa flanko de la rivero. La komandanto ordonis flosan elsendi. En la mezo de la rivero ĝi estis subakvigita de malamika obuso. La naĝantoj estis revokitaj. La unua transiro malsukcesis.

Dua provo estis planita por la nokto de la Novjara Tago. En la Antaŭvespero de la Nova Jaro, la sama nokto de malsukceso de la unua provo, ĉiuj batalantoj de la regimento mobiliziĝis por konstrui flosojn; al tiuj kiuj scipovis remi estis asignita la rolo de remistoj en la venonta transiro.

Novjara Tago. La preparadoj estis atente ekzamenataj kaj ĉiuj atendis senpacience la alvenon de la nokto. Fine, noktiĝis. Facilmovaj kaj senbrue la batalantoj surflosiĝis. La unua flosa sin pafis fluge al la kontraŭa bordo, sekvate de la dua. Ili tuj malaperis en la peĉnigran nokton. Ne estis signoj ke la malamiko ilin malkovris. La duan flosan komandis la estro de la unua roto, Maŭ Ĝen-hŭa. Kun li estis kvin batalantoj armitaj per unu malpeza maŝinpafilo kaj du fusiloj. Atinginte sian celon, ili bruligos alumeton por signali sian surteriĝon.

Iliaj kamaradoj, pretaj por ekagi sur la suda bordo, fiksrigardis trans la malluma vasto de akvo al la montoj malklare konturitaj kontraŭ la ĉielo, senpacience atendente la signalon. Unu, du, kvin, dek minutoj pasis... sed ankoraŭ nenia signalo. Ĉu la flosoj ankoraŭ antaŭen iras? Ĉu io okazis al ili? Ĉu ili atingis la alian bordon aŭ ne? Mil neresponditaj demandoj svarmis en niajn cerbojn. En tia situacio, nenia helptrupo povis esti elsendita.

Ni atendis tutan horon. Tiam la unua flosa revenis. Kio okazis? Ni ĉirkaŭamasigis kaj flustris demandojn. La flosa iris duonvoje trans la riveron, sed en la rivermezo la rapida torento ĝin kaptis kaj forportis 2-3 kilometrojn malsupren laŭflue. La flosa estis preskaŭ renversita de la ondoj. La ataka aro ne povis plu sin orienti kaj estis devigata reveni al la suda bordo. Al la dua flosa neniu sciis kio okazis. Aŭskultinte la raporton, la regimento komandanto ordonis trian flosan tuj elsendi. Sed ankaŭ ĝi renkontis malfacilaĵojn mezrivere

kaj estis devigata veni returne. La dua transiro ankaŭ malsukcesis.

Malsukcesoj, unu post la alia. Ĉu Uĝjang estis efektive ne konkerebla? Ne, ni ne povis tion kredi. La anoj de la Ruĝa Armeo estis ordinariaj homoj—laboristoj kaj kamparanoj. Tamen ili iam kontraŭbatalis kaj malsukcesigis la provojn de Ĉiang Kaj-ŝek dispremi ilian amatan Ruĝan Armeon. Por sia revo pri bela estonto ili gajnis multajn batalojn kaj venkis grandajn obstaklojn. Uĝjang nepre devis esti transirita!

Oni decidis fari trian provon dum la tago, kaj transiri perforte. Je la tagiĝo de la dua de januaro, akra-tonaj klaricnoj de la marŝo resonis en la montgorĝoj, signalante por la atako. Sub ŝirmo de intensa pafado, la unuaj tri flosoj kun malpeze armitaj ruĝarmeanoj pafis trans la riveron. Sed je la sama punkto kie la aliaj du flosoj estis devigataj returniĝi la antaŭan nokton, la flosoj malrapidiĝis. Observante, ni vidis la remistojn forte remi kontraŭ la ondoj kiuj tiel balancelgis la flosojn ke ili ŝajnis en danĝero de renversiĝo.

Malrapide la ondoj puŝis la flosojn orienten laŭflue. Ĉu estos alia malsukceso? Sed ne, la bravaj batalantoj, spite al la malamika pafado, obstine batalis por transiri kaj malrapide, sed certe, ili estis gajnantaj la batalon. Ni observis kun ekscitiĝo kiam ili pli kaj pli alproksimiĝis al la norda bordo.

Kiam la gvidanta floso estis ankoraŭ ĉirkaŭ 50 metrojn de la malamikoj, subite eksplodis sur la norda bordo klara sono de maŝinpafilo—pafante al la malamikoj! Kuraĝigite de ĉi tiu bonvena turniĝo de evento, la homoj sur la atakantaj flosoj remis eĉ pli forte al la bordo.

La pafado venis de la antaŭe iranta unuo gvidata de Kapitano Maŭ Ĝen-hŭa kies floso ja atingis la nordan bordon la antaŭan nokton. Tuj kiam ili surbordiĝis, la batalantoj aŭdis akran tintadon de feraj instrumentoj ne malproksime super siaj kapoj. Ili divenis ke la malamikoj certe estas rapide konstruataj fortikaĵojn ie inter la rokoj. Kapitano Maŭ kaj liaj kvin kamaradoj embuskiĝis la tutan nokton. Je tagiĝo kiam ili vidis siajn kamaradojn veni trans la akvon, ili estis ĝojigitaj kaj preparis por la atako.

Surprize atakite, la malamikaj trupoj estis konfuzitaj kaj timigitaj de la neatendita pafado de la maŝinpafilo el la flanko kaj la alkuro de niaj batalantoj kiuj jam surteriĝis sur la norda bordo. Ni rapide okupis la eksterajn postenojn de la malamikoj kaj penetris en iliajn poziciojn.

En tiu momento, venis la malamikaj helptropoj. Koncentriginte sian forton, la defendantaj trupoj faris kontraŭatakon kiu haltigis la antaŭeniron de niaj batalantoj. Tiam alia pelotono de la Ruĝa Armeo jam surteriĝis kaj tuj partoprenis la atakon al la malamikoj. Ili estis repuŝitaj. Tamen, malhelpate de la mallarĝeco de la montvojoj kaj la malfavora tereno, niaj batalantoj devis dummomente haltigis sian antaŭeniron. Profitante ĉi tiun okazon, la malamikoj faris duan kontraŭatakon kaj repuŝis la gvidantan subpelotonon de la Ruĝa Armeo. Kelkaj batalantoj oferis siajn vivojn.

Estis kriza momento en la batalo por la pasejo. Laŭ ordono de la oficiro komandanta la transiron, iu pelotono surgrimpis la krutajon en la maldekstra flanko de la malamiko, okupis la montpinton, kaj de tie ekpafis al la malamikoj. Samtempe alia roto transiris la riveron kaj tuj sin ĵetis en la batalon. La furioza batalo baldaŭ atingis sian zeniton kaj la malamikoj estis fine

elpelitaj el siaj pozicioj. Triumfe ni kuris al la plej altaj punktoj de la montoj kaj okupis ĉiujn postenojn. La Kuomintangaj trupoj sin retiris disbatite en la direkto de Zunĵi. Tiel la Ruĝa Armeo aldonis alian venkon al sia gloro—la transiro de Uĝjang-rivero.

Je la tagiĝo de la 3-a de januaro, la Laborista kaj Kamparana Ruĝa Armeo okupis la urbon de Zunĵi, 120 liojn de Uĝjang-rivero.

Al la Plej Bezonaj Postenoj

—Asignado de Novaj Diplomitoj—

La nombro de diplomitoj el kolegioj kaj universitatoj rapide pligrandiĝis dum la pasintaj du jaroj. En tiu ĉi somero tridek kvin mil novaj diplomitoj, t. e. duoble tiom kiom en 1951, eliros el ĉirkaŭ 200 altedukaj institutoj de Ĉinio, kaj inter ili la diplomitoj el la natursciencaj fakoj kvaroble plimultiĝis.

Plano estas jam pretigita por ilin surpos-tengi. La gvida principo de la asignado estas koncentrigi tiujn diplomitojn sur la plej gravajn kampojn de nacia konstruado, samtempe pri-atentante iliajn specialajn sciojn, personajn talentojn, aspirojn kaj problemojn. Dum asignado oni demandas la studentojn pri iliaj aspiroj, personaj situacioj kaj problemoj. Arangoj estas faritaj por certigi ke geedzaj paroj laboru en la sama loko kaj oni ankaŭ donas atenton al tiuj problemoj kiel sano, ekonomiaj malfaciloj kaj dependaj gepatroj.

Ĉar nun estas la unua jaro de la unua kvinjara plano, 46 procentoj de la diplomitoj estos asignitaj al industrio, scienca esplor-laboro kaj postenoj en universitatoj kaj kolegioj. En industrio unue estas konsiderata la bezono de la fera kaj ŝtala, elektropova, karba, maŝinfabrika kaj certaj aliaj industrioj, precipe la desegnaj kaj konstruaj laboroj pri novaj fabrikoj kaj minejoj.

Dek kvar procentoj de ĉiuj tiuj diplomitoj estos asignataj al laboroj komunika, agrikultura, forsta, akvokonserva kaj financa. Dek du procentoj farigoj instruistoj en liceoj por plenumi la ĉiam pli kaj pli urĝan postulon tiean. Medicinaj studentoj estos ĉefe asignataj al fabrikoj, minejo, kamparoj, forststacioj, komunikcentroj kaj akvokonservaj konstruejoj kaj ankaŭ por provizi registarajn laborantojn kaj instruistojn per senpaga kuraco. Aliaj iros al kulturaj, politikaj, militaj kaj registaraj institucioj.

Granda entuziasmo regas inter la diplomitoj. Ili havas ardan deziron partopreni en la laboro de landa konstruado kaj volas iri al la ajn posteno ie ajn, kie oni opinias ke ili povos fari plej efikan servon al sia patrio.

La okulfrapa kontrasto inter la perspektivoj de la diplomitoj antaŭ kaj post liberigo estas facile rimarkebla. Dum la tiama ĝenerala fenomeno estis ke diplomitoj fakte signifas senlaborecon, la hodiaŭaj diplomitoj ĝuas ĉiun ŝancon kaj konsideron donitajn de la Popola Registaro.

Mi Ĉiam Restos al Vi Kiel Antaŭe

Gŭo Sjan-ĉjoŭ

Iun tagon en decembro, 1950, kiam Gŭo Ĝjoŭ-gaj iom post iom rekonsciigis el sveno sur la lito de hospitalo en la Nordoriento, li trovis ke li kuŝas en pura malsanula ĉambro. Jen li ekrememoris kiel li aliĝis al la Ĉinaj Popolaj Volontuloj kaj transiris Jalu-riveron antaŭ du monatoj kaj kiel li sin jetis al batalo kontraŭ la Usona invadarmeo kaj kaptis la malamikojn vivaj. Rememorante tion, li ridetis kaj volis eksidiĝi. Ĝuste tiam, flegistino venis al li por ŝanĝi la bandaĝon. Kiam la litokovrilo estis fortirita, Gŭo ektrovis ke jam mankas al li la maldekstra piedo.

La vorto "kripliĝo" tuj superregis lin. Lia penso sin turnis al la familio, al la edzino. Li pensis: kiel sentos mia edzino kiam ŝi sciigos pri mia kripliĝo? Ĉu ŝi volus daŭre kunvivi kun homo kiu perdis membron kiel mi, kvankam ni ĉiam bone interamas dum la kvin jaroj de geedzeco kaj jam havas infaneton? Ju pli Gŭo Ĝjoŭ-gaj pripensis, des pli li konfuziĝis. Finfine, li skribis leteron al sia edzino Lo La-ĵing ĉe Ĵeŝujkeng, Taŭĵŭan-gubernio, Hunan-provinco. En la letero li nur diris ke li revenis al la patrolando el Koreio por ripozo post malsano. Li ne menciis pri tio ke li jam ne plu havas la maldekstran piedon.

En majo, 1951, Gŭo Ĝjoŭ-gaj estis translokita de la Nordoriento al hospitalo en Sian, kie la doktoro decidis amputi al li la dekstran piedon kiu jam grave gangreniĝis pro vundo, ĉar nur tio povis lin savi. Li iam afliktiĝis pro la perdo de la maldekstra piedo, kaj nun ankaŭ la dekstra perdiĝis. Tamen sub la eduko de la Partio, li sukcesis forpeli la momentan senton de pesimismo kaj malesperiĝo. Li ne perdis fidon pri la vivo, kaj estis firme konvinkita ke li ankoraŭ povos bone lerni kaj labori. La fortega volo de Pavel Kolĉagin kaj la "Senkrura Aviadisto" de Sovetunio donis kuraĝigon al dudekkvin-jara Gŭo Ĝjoŭ-gaj.

Sed kiam ajn Lo La-ĵing aperis en lia cerbo, lin ekposedis alia penso: "Kiel mi povos lasi ŝin kunvivi por ĉiam kun kriplulo kiel mi? Ŝi estas ankoraŭ juna, mi detruos al ŝi la feliĉon!" Post kelk-taga pripensado, li decidis kaj ekprenis plumon kaj skribis la jenan leteron:

"La-ĵing: Bonvole min pardonu! Mi kaŝis de vi ĝis nun la fakton ke mi jam estas senpieda kriplulo... Mi longe konsideris; mi ne volas lasi vin ĉiam kunesti kun kriplulo, kaj nun mi metas antaŭ vi la peton de eksedziĝo."

Post ne longe, la respondo de Lo La-ĵing alvenis. Gŭo Ĝjoŭ-gaj malfermis la leteron en eksciteco. La vortoj en la letero unu post la alia klare sin prezentis al liaj okuloj:

"...Kia diro estas la via? Vi kripliĝis, sed tio estas pro la defendo de nia feliĉa vivo, pro la defendo de la paca konstruo de nia patrolando, tia kripliĝo estas gloro. Mi antaŭe aprobis al via ago, kaj nun mi havas la saman opinion. Ĉu vi ja dubas pri tio? Tio estas malprava. Ĝjoŭ-gaj, kiel mi povas disiĝi de vi—mia

glora kamarado kaj edzo? Ne, mi ne nur ne povas disiĝi de vi, mi ankaŭ decidas tuj iri al vi en Sian por vin vidi. Vi estas la Plej Aminda Homo, mi volas kunesti kun vi por ĉiam..."

Gŭo Ĝjoŭ-gaj legis kaj relegis la leteron, kortuŝite ĝis larmoj. Li trovis ke kvankam li jam edziĝis al Lo La-ĵing por kvin jaroj, tamen nur nun li ŝin komprenas. Gŭo Ĝjoŭ-gaj des pli sentis la amindecon de sia edzino. Li skribis leteron en respondo al ŝi, kritikante sian propran eraron kaj konsilante ke portempe ŝi ne venu por ŝpari la tempon por produktlaboro kaj la veturpagon.

Ekde tiam Gŭo Ĝjoŭ-gaj denove komencis ĝoje vivi kaj penegis labori kaj lerni. Krom sia lernado, li ankoraŭ regule donis al honoraj armeanoj en la hospitalo klerigajn lecionojn. Sub lia sola gvido, analfabetoj kiel Lĵoŭ Ĝin, Tjan Joŭ-ŝan, Je Baŭ-laj kaj aliaj jam scipovis legi tagjurnalajn kaj skribi leterojn, kaj ankaŭ solvi elementajn aritmetikajn problemojn. Tiel Gŭo Ĝjoŭ-gaj estis rekomendita dum sia resaniga ripozo kiel "Ripoz-modelo".

En septembro lastjare, Gŭo Ĝjoŭ-gaj revenis de Sian al Ĉangŝa en Hunan-provinco, kaj studis en la Hunan-a Edukejo por Honoraj Armeanoj. La 14a de decembro estis malvarmega tago, kaj Gŭo Ĝjoŭ-gaj estis atente lernanta en sia ĉambro. Subite la pordo de la ĉambro malfermiĝis kaj antaŭ liaj okuloj aperis Lo La-ĵing. Li unue pensis ke li estis en sonĝo. Nur kiam li aŭdis la ekscitan alvokon de La-ĵing: "Ĝjoŭ-gaj!" li kredis ke tio estas fakto. Li ekstaris kaj iris al ŝi per siaj du nove fiksitaj artefaritaj piedoj. Ili rigardis unu al la alia por momento, ne povante ekparoli.

Lo La-ĵing loĝis tie por pli ol duon-monato. La paro respektis, amis, helpis kaj konsoleme priatentis unu la alian, tiel ke ilia amo eĉ pliprofundigis. Timante ke estus malfacile por Ĝjoŭ-gaj vivi for de hejmo sen piedoj, La-ĵing estis preta venigi lin hejmen por ke ŝi mem povu prizorgi lin kaj samtempe por ke ilia infano povu vidi sian patron. Sed dum la duonmonata restado, ŝi vidis ke la Partio kaj la popolo tre bone zorgas pri lia vivo. Ĉiutage, post energia lernado iuj kantis, aliaj ludis muzikajn instrumentojn, aŭ gaje ludis diversajn ludojn. Kelkiam ili kolektiĝis kaj ĉiuj priparolis pri siaj respektivaj idealoj—iuj decidis alpreni edukan laboron post sia elernado por bone eduki la junan generacion; iuj deziris labori en la registaraj oficejoj kiel kadroj por partopreni la organizan laboron de la landa konstruado; iuj esperis rekte partopreni industrian aŭ agrikulturan laboron en fabrikoj aŭ en la vilaĝoj. Vidinte tion, Lo La-ĵing pli trankviliĝis. Kiam ŝi ekiris hejmen, ŝi diris kvazaŭ-jure al sia edzo:

"Mi certe plibonigos la produktan laboron post mia reiro al hejmo. Ne ĝenu vin per la aferoj de la familio, ĉion mi surŝultrigos. Mi ĉiam restos al vi kiel antaŭe!"

En la jaro 1949 kiam la tuta ĉeflando de Ĉinio liberigis, senpaga medicina servo jam longe ekzistis en la malnovaj liberigitaj regionoj. Tuj poste ĝi etendiĝis al ĉiuj regionoj en Ĉinio tiam tuŝitaj de katastrofoj kaj epidemioj kaj al ĉiuj registaraj laborantoj sub la provizosistemo (t.e. tiuj, kiuj ricevas viv-tenaĵojn anstataŭ salajro). Kun la publikigo de Regularo de Laborasekuro je la 26a de februaro 1951, tia servo estis pligrandigita kaj inkluzivis industriajn kaj minejajn laboristojn kun iliaj familianoj, entute pli ol dek milionojn da homoj. En la sekvinta jaro tiu ĉi sistemo etendiĝis al ĉiuj antaŭaj revoluciaj bazoj kaj naci-minoritataj regionoj kun rezultato ke pli ol 96 milionoj da homoj ekrajtis ricevi medicinan servon, kiu estis parte aŭ tute senpaga.

Konstanta Disetendiĝo

La rapida antaŭenpaŝo de ĉina ekonomia rekons-truado, la plifortiĝo kaj disvolviĝo de medicinaj organizoj kaj plimultiĝo de ilia personaro pretigas konstante pligrandigantan materialan bazon por plivas-tigi medicinan zorgon. Sekve, je la 27a de junio 1952 senpaga kuraco ebligis por ĉiuj registaraj laborantoj inkluzive tiujn en edukejoj kaj ŝtatfunkciigataj ekonomiaj entreprenoj, kaj ankaŭ por la personaro de ĉiuj popolaj organizaĵoj kaj demokrataj politikaj partioj, kies tutsumo atingis kelkajn milionojn da personoj.

Ĉe registrejo por senpaga medicina servo



Por krei la necesajn kondiĉojn por efektiviĝi la novan disetendiĝon, la Ministerio de Higieno mobilizis 350 medicinajn diplomitojn, kiuj tute sin dediĉas al ĝi. Ankaŭ estas rezervitaj 8,677 hospitalaj litoj, 4,687 sanatoriaj litoj kaj 295 medicin- kaj san-stacioj inkluzive specialajn klinikojn por servi al la profitantoj en tiu ĉi kategorio. En la vilaĝoj, guberniaj kaj distriktaj san-stacioj partoprenas tiun ĉi laboron. Aldonaj instalaĵoj estas aranĝataj ĉijare celante pretigi po 6-8 hospitalajn litojn por ĉiu 1,000 registaraj laborantoj.

Senpaga Medicina Servo por Milionoj

Li De-ĉjŭan,
Ministro de Higieno

Samtempe, la nombro de grupoj kiuj rajtas senpagan servon daŭre kreskas. De oktobro, 1952, ĉiuj instruistoj kaj laborantoj en privataj lernejoj estis envicigitaj. Komence de ĉi jaro la servo etendiĝis al ĉiuj universitataj studentoj, kaj administranta personaro en la vilaĝoj tra tuta Ĉinio.

Dankemo de la Popolo

Ĉiufoje kiam la senpaga medicina servo pli disvas-tiĝis, registaraj higien-organizoj ricevis multajn vizitojn kaj leterojn de homoj, kiuj volis esprimi sian ĝojon kaj dankon. La edzino de Tung Ljen de Jangĝoŭ, Kiangsu-provinco, diris al san-laboranto: "Mia edzo ĉiam ĉagreniĝis pro senlaboreco. Nun sub la Popola Registaro, ne nur lia okupo estas sekurigita, sed lia sano estas ankaŭ garantiata. Sub la reĝo de reakcia Kuomintang, ni eĉ ne povis sonĝi pri tiaj kondiĉoj." Ljŭ Da-peng, registara oficisto en Nanking, ankaŭ rememoris la pasintaĵon: "Kiam mi estis knabo en lernejo, mia patro estis eta civila oficisto. Ni estis malriĉaj kaj li ĉiam ĉagreniĝis. Iutage li malsaniĝis kaj ne povis eliri por labori, tial li skribis leteron por peti forpermeson. La respondo estis insulta skribajo de lia superulo minacanta eksigi lin pro malsano-ŝajnigo. Li estis tiel kolera kaj malĝoja ke lia malsano pli malboniĝis. Kiel diference estas hodiaŭ!"

Medicin- kaj san-laboro en nova Ĉinio rapide disvolviĝas. Tio estas unu el la necesaj paŝoj por garantii la sukceson de nia landa rekonstruado. Hodiaŭ la ĉefa emfazo estas metita sur la servo al produkto kaj la disvolviĝo kaj pliboniĝo de la laborasekura servo en fabrikoj kaj minejoj. Samtempe, ni trejas personaron kaj starigas novajn instalaĵojn rapide, kreante la fundamenton de universala, socialigita medicinservo por ĉiu viro, virino kaj infano en Ĉinio.

Meng Taj

La Historio de Modela Laboristo de la Fera-ŝtala Kompanio de Anŝan

Ŝju Ĉi



De la unua momento de mia alveno en Anŝan oni diris al mi, "Vi devas renkonti Meng Taj". Kien ajn mi iris, mi aŭdis pri liaj heroajoj. Neniu individua laboristo faris pli grandan kontribuon ol li en la rekonstruado de la granda ŝtata Fera-ŝtala Kompanio de Anŝan. Kaj tial, je la fino de la tago-laborvico, mi kuniĝis kun la laboristoj amasiĝantaj en miloj kaj paŝantaj el la laborejoj de la fabriko. Ili piediris orienten al la kvietaj kaj bone konstruita loĝ-distrikto de la urbo Anŝan. La larĝaj homaj torentoj disiĝis en pli malgrandajn riverojn inter la stratoj borderitaj de poploj kaj fine malaperis en la vicojn de belaj domoj.

Mi haltis antaŭ ruĝbrika vilao kaj frapis la pordon. Meng Taj mem malfermis ĝin kaj kun varma manpremo kondukis min en sian sidĉambron. Li estas altkreska sed ankaŭ dika. Li ne aspektas kvindeksejara. Rideto ĉiam ludas ĉirkaŭ la anguloj de lia buŝo. Li moviĝas malrapide, atentante tiujn ĉirkaŭ si. Li ankoraŭ parolas kun la akcento de sia hejmm-provinco Hopej. Parolante al Meng Taj, oni baldaŭ klare vidas, kial la laboristoj de Anŝan lin tiel alte estimas. Oni estas tuj impresita de lia simpleco kaj modesteco. Ili harmonias bone kun la medaloj, kiujn li portas ĉe festaj okazoj, memoraĵoj de liaj multaj atingoj kiel eltrovinto, organizanto kaj malegoista laboristo por la popolo.

En sia juneco Meng Taj suferis sub la skurĝo de bienula subpremo. En la aĝo de dudek-kelkaj jaroj li venis al la Nordoriento, kie li unue laboris en la karbocentro de Fuŝun dum dek jaroj, kaj poste en Anŝan dum dudek-kvin jaroj. Ĉi tie li estis ekspluatata kaj subpremata laŭvice de la militestroj, la japanaj imperialistoj kun siaj marionetoj la "Manĉukuo"-oficistoj kaj la Kuomintangaj reakciuloj. Estis karakterizo de tiu tempo, ke li, laboristo kun bonega teknika kapableco kaj kun karaktero de la plej alta kvalito, homo kiu amis sian laboron kaj siajn maŝinojn, devis suferi konstantan malsaton kaj humiligon. Li vivis en socio, kiu ne estis kapabla altetaksi homan valoron.

Kiam dum sia freneza retiriĝo, la Kuomintangaj oficistoj dispecigis maŝinojn kaj forportis ilin povagonare por vendi, li sentis kvazaŭ lia propra korpo estus

tranĉita en pecojn. La fabrikoj fermiĝis. Li kaj lia familio vivis de sovaĝaj herboj kaj tritika brano. Li vidis siajn filinojn kuŝi inertaj sur la briklito, tiel malfortaj pro malsato, ke ili ne povis stariĝi.

Liberigo

Kelkajn semajnojn poste en la vintro de 1948 Meng Taj vidis la Liberigan Armeon marŝi en Anŝan'n. Klara, forta voĉo ekster lia ruiniĝanta kabano vokis lian nomon—"Meng Taj!".

La liberiga armeo tuj komencis rekolekti la veteran-laboristojn ĉirkaŭ si. Tiu ĉi kamarado estis sendita de la ĉefo de la Anŝan-a personaro-sekcio por peti Meng Taj iri al la Blanka Konstruaĵo—la administrejo de la Fera-ŝtala Kompanio. Meng Taj iris. La kadro, kiu akceptis lin kun granda afableco, petis lin sidiĝi sur grandan ledseĝon. En pli ol dudek jaroj de sia vivo en Anŝan Meng Taj eĉ ne unufoje eniris la Blankan Konstruaĵon, nek sidis iam ajn en leda remburita seĝo. Li ne kuraĝis sidiĝi. La kadro devis persiste peti lin eksidi. Tiam ili detale parolis pri la ebleco refunkciigi la fabrikojn.

Kiam Meng Taj revenis de la Blanka Konstruaĵo, li hejmen portis kvindek ĝinojn da nutraĵoj kiel urĝbezona manĝoporcio. La unuan fojon en multaj semajnoj la familio havis sufiĉe por manĝi. Rekonstrua laboro en Anŝan estis baldaŭ komencota, sed dume al Meng Taj estis asignata laboro en Tunĝhŭa en Ljaŝdung-provinco.

Meng Taj tuj vidis, ke li vivas en nova socio. Li loĝis komferte en sia nova hejmo en Tunĝhŭa, sed eĉ tiel, la administrantaro demandis lin de tempo al tempo kun zorgemo: "Ĉu estas io, kion vi bezonas?" Ne! Li ne bezonis ion ajn—Vivo jam estis bona! La unuan fojon li konis veran feliĉon—la feliĉon de laboro liberigita el subpremo. Nun li vere sentis, ke li vivas en sia propra lando, kaj ke liaj propraj kunuloj nun fariĝis mastroj.

Li laboris konsciencie kaj ĝoje. Li ĉeestis kunvenojn de la sindikato. Li aliĝis al grupo por politika studado. Liaj bonegaj kvalitoj estis rekonitaj, kaj oni donis al

li multe da respondecaj taskoj. Li faris elstarajn servojn kiel muntisto, kiam la blovfornego en Tunghŭa estis riparata.

Post ne longe li estis resendita al Anŝan. Ŝajnis al li ke li revenis hejmen. Sed la grandaj fornoj estis malvarmaj kaj silentaj. La fabriko estis surkreskita de herbaĉoj. Anŝan estis ruino, sed Anŝan devas esti rekonstruata! Meng Taj estis pli ol preta por la tasko. Ĉar la domaĝo farita de Kuomintango estis tre vasta, refunkciigo ne estis facila. Multe da novaj ekipaĵoj estis bezonataj. Listoj estis faritaj. Mendoj estis elsenditaj por anstataŭaĵoj.

La Patriota Provizejo de Meng Taj

Iom da tempo estis bezonata por ĝisatendi la plenumon de la mendoj, sed Meng Taj ne estis homo kiu emis sidadi atendante. Ĉirkaŭirante la blovfornegon li turnis sian atenton al la amasoj da metal-fragmentoj disjetitaj ĉirkaŭe. Dum la marioneta "Manĉukuo"-reĝimo la laboristoj ne malofte intence forjetis valorajn ekipaĵojn. Sub la Kuomintanga okupado tutaj kortoj estis malorde plenigitaj de ĉiuspecaj forjetitaj partoj, inter kiuj ne malmultaj estis efektive en perfekta stato. Meng Taj pensis en si mem, "Ĉi tie estas altvaloraj provizoj kuŝantaj ĉie sur la tero. Kia malŝparo!" Kaj li komencis serĉi tra la amasoj de forjetaĵoj materialojn, kiuj povus esti utilaj por ripari la blovfornegon. Lia iniciatemo ekscitis siajn kunlaborantojn kaj baldaŭ granda grupo estis elektanta la forjetaĵojn. Post klasifikado ili riparis siajn trovaĵojn. Iom post iom granda budo estis plenigita de provizoj. Kiam raporto pri tio, kio estis farita, atingis la aŭtoritatojn de la Kompanio, ĝi estigis veran miron. La fakto pruvis ke la provizejo de Meng Taj havas pli da krompartoj ol la magazeno de la Kompanio.

Ĉe amaskunveno la sekretario de la Partio nomis la kolektaĵon "La Patriota Provizejo de Meng Taj" kaj malfermis ĝin por unutaga ekspozicio. Rezulte de tio amasa kampanjo estis iniciatita en la fabriko por trovi kaj liveri savitajn materialojn. Tio ege rapidigis la rekonstruadon de Anŝan. Ne longe poste Meng Taj estis akceptita en la Partion.

Unu post la alia la blovfornegoj estis riparitaj. La provizejo de Meng Taj liveris grandan kvanton da materialoj por ĉiu riparlaboro. Ĝi enhavis sufiĉe da materialoj por ripari kvar blovfornegojn. Ili ankoraŭ liveris trezorojn meze de 1953.


La Heroo

Tio estis nur la unua el la grandaj servoj de Meng Taj por popola Anŝan. Foje li ne hezitis salti en du futojn profundan trogon da glacia akvo por ripari kelkajn difektajn tubojn por malebligi ilian frostigon en vintro. En varmaga somera tago, kaŭze de eraro en la labormetodo, elfluo de fandita fero subite okazigis. La fandita metalo, veninte en kontakton kun la akvo de la malvarmiga ekipaĵo, kaŭzis ripetigantajn eksplodojn, kiuj disvastigis fumon kaj nebulon tute ĉirkaŭ la blovfornego. Teknikistoj kaj laboristoj ne sciis kion fari. Meng Taj kun sia kutima multimemo kaj spiritpreteco ekkuris tra la densa nebulo al la fonto de ĝeno kaj danĝero. Du aliaj laboristoj kurage sekvis lin. Spite la eksplodojn Meng Taj malsupreniris proksimen al la spiltruo, kie estis tre mallume, kaj akvo gutis kiel pluvo. Li eltrovis, kio estis malĝusta, rapide revenis kaj helpis organizi ripar-laboron, kiu estis sukcese efektivigata en la sekvantaj du tagoj.

La Eltrovinto

Meng Taj laboris senlace. Foje li malsanigis kaj estis sendita al sanatorio. Sed li ankoraŭ pensis pri sia laboro. Li estis projektanta instalati aspergilon sur la polvokaptilo, ĉar, dum la feropolveroj precipititaj el la gasoj de la blovfornego povis esti portataj al la kungluiga bakejo por esti reŝangataj en materialojn por fandado, la polvo, kiu disvastiĝis kiam la polvigita fero kaj mineralo estis kolektataj, sufokis la laboristojn ĉe la laboro kaj estis malutila al la sano. La aspergilo ŝarĝus la polverojn per akvo kaj malebligis ilin flugi ĉirkaŭen. Kaj krome, kiam la polvo estis enmetita en vagonojn por la kungluiga bakejo, ĝi devis esti portata al granda aspergilo, kiu efektive nur malsekigis la supraĵn tavolojn. La eltrovaĵo de Meng Taj ankaŭ eliminus tiun ĉi ekstran laboron kaj ŝparus transport-koston atingantan ĝis 1,900,000 juan-oj potage. Kiam laboristo—amiko venis viziti lin, Meng Taj senprokraste priskribis al li la ideon munti aspergilon je la origino de la ĝeno—interne de la polvokaptilo. Tamen la eksperimento poste farita ne estis sukcesa, kaj la afero estis forlasita.

Informite pri la rezulto, Meng Taj pripensadis profunde. "Ĉesigi tiun eksperimenton signifas perdon de preskaŭ du milionoj da juanoj potage", li diris. "Ni ja ne povas esti tiel facile malkuraĝigitaj." Li eltrovis pretekston por foriri de la sanatorio, kaj ricevis la permeson de la kuracisto transiri al libertempa ripozhejmo. Tiam li rekte reiris al la fabriko, studis aspergilon kiu estis farita, kaj vidis, ke ĝi estas tro malgranda. La sekvintan tagon li faris pli grandan.



Meng Taj (la dua de dekstre) lernigas al la laboristoj teknikon dum praktikado.

Post pluaj eksperimentoj li finfine sukcesis. Nur tiam li reiris por daŭrigi sian ripozon.

Meng Taj komencis sian karieron kiel vinkpisto. Poste li fariĝis tubmuntisto. Post la liberigo li estis promociita al sekiestro. Lia bona kaj sindona laboro plialtrangis lin sinsekve al la pozicioj de teknikisto, asistanto-inĝeniero kaj poste de asistanto-ĉefo al ĉefo de la riparejo. Li faris sennombrajn inventojn kaj novigojn, grandajn kaj malgrandajn. Inter ili estas plibonigoj de malvarmigaj arandoj, vaportuboj, muld-maŝinoj por ferfandado, kuleregoj kaj aliaj maŝinoj kaj maŝinpartoj. Li enkondukis raciajn metodojn de laboro en multaj kampoj, ŝparante laborforton, farante ĝin pli efika, kaj plifaciligante penan laboron, farante ĝin pli sendanĝera. La riĉaĵoj, kiujn li kreis, kaj la ŝparoj, kiujn li efektivigis, estas nekalkuleblaj.

Per unuanima voĉdono Meng Taj estis elektita modela laboristo de la plej alta rango por la tuta urbo kaj reprezentanto al la Unua Tutlanda Konferenco de Modelaj Laboristoj. Tra la tuta vojo al Pekino oni prezentis al li florojn, kaj li estis aplaudata kaj honorata de la popolanoj. Ĉe la malferma ceremonio de la Tutlanda Konferenco de Modelaj Laboristoj, Prezidanto Maŭ Ze-tung sidis en la centro de la prezidantaro, apud li sidis ĉefkomandanto Ĉu To kaj Ĝaŭ Ĝuej-lan, heroino kaj modela laboristino; kaj apud ŝi estis li, Meng Taj.

KURANTAJ AFEROJ

Naturgas-ŝakto Drilita en Seĉuan

La drilado de la unua gas-ŝakto de Seĉuan komencis lastmonate kiel parto de la projektita esplorado pri natura gaso. Tiu ĉi gaso, kiu povas servi kiel hejtajo por lokomotivoj, ŝarĝaŭtoj, ŝipoj kaj en elektropova industrio kaj ankaŭ povas esti utiligata por fabriki artefaritajn fibron kaj sterkajon, troviĝas grandkvante en Seĉuan.

Esplorlaboro pri la gasŝakto komencis en septembro, 1951, kiam specialistoj konstatis la ekziston de riĉa mino de naturgaso en tiu ĉi sudokcidenta provinco. Esplorado malkaŝis ke naturgaso sin trovas almenaŭ en 10 regionoj de tiu ĉi provinco.

Mekanikigita Ŝu-fabrika Finkonstruiĝis

En Sian, la ĉefa urbo de Nordokcidenta Ĉinio, mekanikigita ŝu-fabrika finkonstruiĝis kaj estas elverŝanta pretigitajn produktaĵojn je la rapideco de paro da ledaj ŝuoj po 30 sekundoj. La Nordokcidento estas fama pro kelkaj el la plej grandaj kaj plej bonaj bovo-bredaj regionoj, kiujn la lando posedas.

Ĉi tiu moderna fabrika komencis konstruiĝi en 1951. Ĉi estas konstruita laŭ la progresinta teknika projekto de la ĉeĥoslovaka ŝu-fabriki industrio. En la fabrikado de ĉiu paro da ŝuoj estas entute 74 procedoj, kiuj ĉiuj estas mekanikigitaj.

Komerca Arango inter Ĉinio kaj Britlandaj Komercestoj

Post sinceraj intertraktadoj kaj sur la bazo de egaleco kaj reciproka profito, komerca arango estis subskribita je la 6a de julio inter la Ĉina Ŝtata Importa kaj Eksporta Korporacio kaj la Britlandaj komercestoj kiuj alvenis Ĉinion antaŭ nelonge.

laboristo de Anŝan. Li rigardadis Prezidanton Maŭ, dirante al si mem "Ĉi tie estas la homo, kiu liberigis la suferantan popolon de tuta Ĉinio. Ĉi tie estas la homo, kiu donis al mi forton kaj novan vivon." Meng Taj faris paroladon ĉe la konferenco transdonante siajn spertojn al aliaj.

Meng Taj mem nur rakontis al mi duonon de la historio, la nurajn faktojn. Mi devis lerni de aliaj pri lia kuraĝo, eltrovemo kaj sindoneco.

Kien ajn li iras, homoj venas al li kaj premas lian manon kun profunda respekto kaj amo. Iun tagon mi vidis lin ĉirkaŭata de Junaj Pioniroj. Iel mi estis rememorigita pri dika maljuna arbo en plena florado. Mi vidis lin iun dimanĉon posttagmeze tiun ĉi printempon ĉirkaŭata de labormodeloj de Anŝan. Ili estis aŭskultantaj Meng Taj atente, lernantoj de la maljuna heroo.

Ĉirkaŭ ili estis la panoramo de Anŝan, la grandiozaj rezultoj de ilia laboro. Inter tiuj ĉi estis la altleviganta blovforno N-ro 8—nun tute aŭtomata, la plej moderna ĉampionfandisto de fero por la kvinjara plano de la nacio. Apud ĝi la forno N-ro 7 estis leviganta, eĉ pli granda giganto. Sur ĉiu flanko novaj konstruaĵoj estis aperantaj, kreataj de la laboristoj meze de la sonorego de metalo, sub la ruĝaj flagoj de honoro por laboro bone farita.

Tiu ĉi arango difinas por ambaŭ flankoj komercaĵo-interŝanĝon, importan kaj eksportan, sumantan je 30 milionoj da funtoj sterlingaj (pagotaj per funtoj sterlingaj).

La Brita flanko vendos al Ĉinio: metalon kaj metalajn produktaĵojn, maŝinojn, elektrajn aparatojn, kemiaĵojn, ilojn kaj sciencajn instrumentojn, medikamentojn kaj kirurgian ekipaĵon, komunikado- kaj transporto-ekipaĵon, k. c.

La komercaĵoj kiujn Ĉinio estos vendanta al la Brita flanko estas: vegetaj-oleo kaj oleo-semoj, dombesto-produktaĵoj, ovo-produktaĵoj, mineraloj, teo, silko, manfaraĵoj, k. c. Laŭ la arango, la Ĉina Ŝtata Importa kaj Eksporta Korporacio, subskribos konkretajn negoc-kontraktojn aparte kun la individuaj membroj de la komercisto-grupo kiu venis Ĉinion.

Lu Ŝju-ĝang, Administranto de la Ĉina Ŝtata Importa kaj Eksporta Korporacio, subskribis la komercan arangon por la Korporacio.

La subskribintoj de la Brita flanko estis: Harold Hildred Spencer, Roland Berger, Bernard Buckman, William C. Gomersall, John V. Gray, Alexander Harvey, Sidney George Holmes, Wilfred King, Sidney Arthur Lane, John K. Milner, Jack Perry, Albert Poulden, Sidney A. Rotheray, Sidney Gordon Sloan, Dan Dungleison Stobart kaj Kenneth G. Treherne.

Ĉeestis la subskriban ceremonion: Nan Han-ĉen, Prezidanto de la Ĉina Komitato por la Akcelado de Internacia Komerco, Ĝji Ĉaŭ-ding, Ĉefsekretario, Ŝje Ŝjaŭ-naj, Estro de la Kontakta Departemento de la dirita Komitato; Ĉaŭ Ĝung-ŝu kaj Li Jing-ĝji, Vicadministrantoj de la Ĉina Ŝtata Importa kaj Eksporta Korporacio.

Ankaŭ ĉeestis la subskriban ceremonion S-ino Joan Robinson, membro de Britlanda Komercesto-grupo vizitanta Ĉinion kaj Vicprezidanto de la Brita Konsilantaro por la Akcelado de Internacia Komerco.



Marŝalo Kim Il Sung, Ĉefkomandanto de la Korea Popola Armeo (dekstre) kaj Generalo Peng Te-hŭaj, Komandanto de la Ĉinaj Popolaj Volontuloj.

Kuo Mo-jo, Prezidanto de la Ĉina Pac-komitato, paroladas ĉe la celebra kunveno en Pekino je la 29a, julio.

Celebro de la Armistico en Koreio



La amaskunveno de 25,000 popolanoj okazigita en Kaesong je la 28a de julio por celebri la subskribon de la armist





John Foster Dulles (la unua de maldekstre) en tranĉeo de Sudkoreia fronto en junio, 1950, donanta personajn instrukciojn je al antaŭvespero de la invado al Norda Koreio.



La heroaj gefiloj de Koreio levigis la Usonaj invadantojn



Kirasitaj unuoj de la Ĉinaj Popolaj Volontuloj iras al batalo.

nevenkeblaj popoloj de Koreio kaj Ĉinio frakasis la barbaran provon de la Usona Registaro akiri venkon per bakteri-milito.



La Korea Popola Armeo kaj la Ĉin. batalkampoj. Ili aklamas la venkon al

Venko Kronas Justeco

La agresiva milito kontraŭ Koreio rezultigis en la finfina malvenko 'teruraj armiloj, ilia napalma (ga La korea popolo, helpate de la ĉ popoloj tra la tuta mondo, ne nur sel de sia lando sed ankaŭ ego redukti



defendi sian patrolandon kontraŭ
kaj iliaj marionetoj.



Minacate de tuja eninvado, la Ĉinaj Popolaj Volontuloj transiras
Jalu-riveron por helpi la korean popolon forpeli la Usonajn
agresantojn.



Pacamaj popoloj tra la mondo subtenas la justan aferon de la kor
popolo. Rumanoj pakantaj donacajojn de varmaj vestaĵoj por Kore

popolaj Volontuloj renkontiĝas sur la
stano per la kunbatalo de la popoloj.

La sorto de la invadanto. Frakasita Usona mekanikigita kolono.

la Batalon por kaj Paco

dukita de Usono kaj ĝiaj satelitoj
la invadantoj malgraŭ ĉiuj iliaj
plenbomba kaj bakteria militado.
popolo kaj subtenate de pacamaj
kurigis la sendependecon kaj liberon
is la danĝeron de nova mondmilito.





La problemoj de militkaptitoj estas unu el la plej malfacilaj problemoj en la intertraktado. La fotoj montras akran kontraston en traktado al militkaptitoj. *Maldekstre*: Usona masakro kaj perforta deteno sub la preteksto de "Volonta Reenpatriigo". *Dekstre*: sentima, paca vivo en militkaptitejo en Norda Koreio.



La interŝanĝo de malsanaj kaj vunditaj militkaptitoj je la 20a de aprilo estis granda paŝo al la solvo de la problemoj de militkaptitoj kaj la subskribo de la Armistika Kontrakto. Loĝantoj de Kaesong bonvenigas revenantajn koreajn kaj ĉinajn militkaptitojn.

Intertraktado Venkas Perforton

Post pli ol du jaroj da intertraktado, la pacienca kaj persista penlaboro por paco de la korea-ĉina flanko finfine alportis la subskribon de la Armistika Kontrakto ĉe Panmunjom je la 10a atm. (korea tempo) en la 27a de julio.



Generalo Nam Il, Ĉefdelegito de la Delegacio de la Korea Popola Armeo kaj la Ĉinaj Popolaj Volontuloj (*dekstre*), kaj Generalo William K. Harrison, Ĉefdelegito de la Komando de la Unuiĝitaj Nacioj, subskribas la Armistikan Kontrakton.

Grandskala Konstruado de Elektra Industrio en 1953

Por provizi la kreskantajn fabrikojn kaj minejojn per elektra povo kaj plenumi la bezonojn de la popolo, elektretoj estas konstruataj aŭ konstruotaj en kelkdek lokoj tra tuta Ĉinio dum tiu ĉi jaro. Pli ol duono de tiuj elektretoj estos parte aŭ komplete finkonstruitaj antaŭ la jarfino. La ĉijara konstru-laboro de elektra industrio estas senprecedenca en ĉina historio.

Pro sia industria postiĝinteco, malnova Ĉinio havis nur tre malfortan elektro-industrion; kaj eĉ de tiu malforta elektra industrio la plejparto estis en la mano de imperiistaj kapitalistoj. Ekzemple, la produkt-kvanto de la Usona Ŝanhaja Elektra Kompanio egalas tiun de ĉiuj ĉinaj elektretoj tra la lando. La Kuomintang-registaro ne nur neglektis disvolvi tiun industrion sed ege detruis ĝin antaŭ sia disfalo. Rezulte de tio, la elektra produkt-kvanto en 1949 eĉ ne atingis tri kvaronojn de la plej alta kvanto antaŭ la liberigo. Post la liberigo, akorde kun ekonomia reviviĝo, la elektra produkto-kvanto pligrandigis kun ĉiu jaro, proksimume duobligante en 1952 tiun de 1949 kaj, laŭ taksado, superonte en 1953 tiun de 1952 je 18.3%.

En la ĉijara konstruado de elektra industrio troviĝas kelkaj novaj elektretoj distingindaj pro sia grandeco, kaj la konstru-laboro de la plejmulto de ili jam komenciĝis. En la Nordokcidento jam alte staras la fabrikdomoj de la plej granda, nova elektreto kaj miloj da laboristoj forto-streĉe sin okupas pri la instalado de maŝinoj. Inter la laboristoj nun ardas entuziasma laborkonkurso celanta plenumi la instaladon de unu generatoro kaj unu kaldronego antaŭ la 1-a de oktobro, kiel iliaj oferdonacoj okaze de la Nacia Tago. La produkta kvanto de tiu elektreto egalos duonon de tiu de la nuna Nordokcidento kaj ludos gravan rolon en la disvolviĝo de la tieaj teksa, maŝina, agrikulturila, prestinktura, kaj faruna industrioj.

En Ĉungking, la konstruado de la plej granda, nova elektreto en la Sudokcidento komenciĝis en la 23a de januaro. Nun la fundamento de la ĉefaj fabrikdomoj estas jam komplete starigita. Pli ol mil laboristoj energie laboras sur la labor-kampo, klopodante ekspedi elektro-povon al la multaj fabrikoj en la Sudokcidento en tiu ĉi jaro. La lastatempa progreso de la Sudokcidenta ŝtal-, fer- kaj maŝin-produktado kaj precipe la konstruado de la Ĉengtu-Ĉungkinga Fervojo—ĉiuj bezonas grandan kvanton da elektro. Post la ekfunkcio de tiu ĉi elektreto ili akiros sufiĉan elektro-povon.

Plej novaj, grandaj elektretoj estas konstruataj en Ĝengĝou, la Centra-ĉinia komunik-centro, kie kruciĝas la Pekin-Hankoua kaj Lunghaja Fervojoj, kaj en Taj-juan, la Nord-ĉinia industria urbo. Kiam la elektreto en Ĝengĝou finkonstruiĝos, ĝi estos la unua novtipa

elektreto en la Centra-sudo. La domkonstruado de tiu elektreto estas jam kompletigita kaj nun vigle progresas la instalado de maŝinoj. Sur la laborkampo de la Tajjuan-a elektreto oni nun metas relojn kaj faras diversajn preparajn laborojn. Maŝinoj pezantaj proksimume du mil tunojn venas unu post la alia. Tiu estos la plej nova elektreto en Norda Ĉinio, kiu elsendos ne nur fortan elektran povon sed ankaŭ vaporon al kemiaj kaj aliaj fabrikoj.

Ankaŭ ie en la Nordoriento granda elektreto estas konstruata. Tiu estos la unua elektreto kun altprema vapormaŝin-kaldronego en Ĉinio kaj la domo estos duoble pli alta ol tiu de ĝenerala elektreto. Tie miloj da laboristoj kaj teknikistoj streĉe laboras por la starigo de diversaj akcesoraj instalaĵoj.

La novaj elektretoj ne nur dissemiĝos en la industriaj regionoj kaj komunik-centroj sed ankaŭ aperos en la borderaj regionoj, alportante lumon kaj varmon al la minoritataj nacioj. En Tihua de Sinkiang-provinco jam konstruiĝas nova elektreto kiu ekfunkcios en la unua duono de la sekvonta jaro kaj kies produkt-kvanto deobligos la nunan de tiu urbo.

Krom elektretoj kun vapor-maŝinoj, granda estas ankaŭ la ĉijara tasko konstrui hidraŭlikajn elektretojn. Tiucela elspezo de la ŝtato dudekobligas tiun de lasta jaro kaj ankoraŭ plimultiĝos en estonteco.

En tiu ĉi jaro la konstruado de kelkaj mezaj kaj malgrandaj hidraŭlikaj elektretoj daŭras en Seĉuan, Junnan, Ĉekiang, Fukien kaj aliaj provincoj. La konstruado de la elektreto ĉe Ĉingjŭandung sur Lungŝi-rivero en Seĉuan-provinco estis parte komencita antaŭ liberigo. Post la liberigo la Popola Registaro disponigis monsumon por la daŭrigo de la konstru-laboro, kiu estos finita en tiu ĉi jaro. Ĉiuj kompletoj da maŝinoj kaj instalaĵoj de la hidraŭlikaj elektretoj, krom tiu ĉe Ŝilung-digo de Junnan-provinco, estas fabrikitaj en Ĉinio, kaj tio estas ja unuafoja okazajo en Ĉinio.

Krom la konstruado de la suprediritaj hidraŭlikaj elektretoj, la Hidraŭlik-elektreto-konstrua Administracio de la Ministrejo por Hejtajo-industrio de la Centra Popola Registaro, kune kun la Ministrejo por Akvo-konservado, mobilizis ĉirkaŭ mil laborantojn por fari grandskalan esploron en la valoj de la Flava Rivero kaj Han-rivero por pli granda hidraŭlik-elektraja konstru-laboro estonta.

Multaj malgrandaj elektretoj estas ankaŭ konstruataj ĉijare de la lokaj industriaj sekcioj kiel en Ŝaŝi, Ŝuatoŭ, Gĉejsuj, Baŭĝi, Tjenŝuj, Ŝjining k.c. En



**La plej granda elektrejo en Sudokcidenta Ĉinio en
Konstruado**

tiu ĉi jaro ankaŭ multe da malnovaj elektrejoj estas rekonstruataj aŭ pligrandigataj por plialtigi la produkt-kvanton.

En ĉina historio neniam antaŭe troviĝis tiaj maŝinoj kaj labor-kondiĉoj kiel tiuj nun en la konstruataj elektrejoj. Plejparto de tiuj elektrejoj havas plej modernajn instalaĵojn, bonajn labor-cirkonstancojn kaj perfektajn sekurigajn arangojn. Ili multe faciligos la pezan korpan laboron, ŝparos grandan kvanton da homforto kaj donos plenan sekuron al la laboristoj dum produktado.

La grandskala konstru-laboro de elektrejoj en Ĉinio progresas sub la malavara helpo de Sovetunio, nia granda frato-lando. La maŝinoj de la grandaj elektrejoj venis ĉiuj el Sovetunio. Senlace la Sovetiaj specialistoj laboras sur la laborkampo kaj senrezerve ili gvidas la laboron de ĉinaj laboristoj kaj teknikistoj per alta scienca tekniko kaj valoraj industri-konstruaj spertoj. Dum la instalado de granda elektrejo n-ro 101, oni efektivigis pli ol 470 proponojn de la Sovetiaj specialistoj, garantiante la glatan plenumon de la instal-plano. Per la ilustrado de sennombraj konkretaj faktoj, la ĉinaj laboristoj kaj teknikistoj eksciis ke lerni la Sovetiajn progresintajn spertojn kaj efektivigi precize la proponojn de Sovetiaj specialistoj estas nepre kondiĉo por finplenumi pli frue nian konstru-laboron. Sur multaj labor-kampoj leviĝas varma tajdo lerni la progresintajn spertojn de Sovetunio. En elektrejo n-ro 101 oni difinis ĉiun merkredon kiel la "tagon por lerni Sovetiajn progresintajn spertojn." Tie oni ankaŭ okazigis malgrandan ekspozicion pri la Sovetiaj progresintaj spertoj kaj starigis diversajn sistemojn por garantii la plenumon de la proponoj de Sovetiaj

specialistoj. Rezulte de tio multaj laboroj progresas rapide kaj bonkvalite.

La fama diro de Lenin: "Sovetio + elektrizo = komunismo" sufiĉe klarigas la gravecon de elektro-industrio. Nun la ĉina elektro-industrio faras nur la unuan paŝon. El la ĉijara plano oni povas vidi ke, dum sia elektro-industria disvolviĝo, Ĉinio zorgas pri la provizado de elektro-povo ne nur al diversaj industrioj, precipe la malpeza industrio, sed ankaŭ al la diverslokaj loĝantoj tra la tuta lando en ilia ĉiutaga vivo. Plue, la konsum-varoj certe plimultiĝos kun la disvolviĝo de malpeza industrio, tial la disvolviĝo de elektro-industrio signifas rapidan plialtigon de la popola vivnivelo, kio ja estas la finfina, komuna celo de ĉiuj ekonomiaj konstru-laboroj en nova Ĉinio.

La Triumfo de Intertraktado

(daŭrigo de p. 170)

faronema Usona monopolistaro, kies ambicio estas superregi la mondon, estas devigata de milita kaj politika malvenko sidigi ĉe la tablo kiel egalulo kaj subskribi armisticon kontraŭ kontrakton registrantan sian senpovecon eĉ por superregi Koreion. Usona imperiismo, kiu ĉiam antaŭe finis militon per diktado de siaj propraj kondiĉoj, estas haltigita en sia invado de vekigintaj popoloj en Azio, kiuj guas simpatiojn de ĉiuj decaj homoj tra la tuta mondo. Aliaj Usonaj delegitoj kaj rigardantoj de ne-usonaj armeoj de la "Komando de la Unuigitaj Nacioj", kiuj ĉiuj reprezentas koloniajn fortojn aŭ Usonajn satelitojn, okupas seĝojn en la flanko de Harrison en la halo, same kiel la reprezentantoj de la monopolaj ĵurnaloj. Ĉar Singman Rhee bojkotis la subskribon de la kontrakto, absolute neniu koreo troviĝas en tiu flanko.

Tute senforte, Generalo Nam Il kaj Harrison subskribis la ses kompletajn da armisticiaj dokumentoj, el kiuj ĉiu en tri kopioj, en la korea, ĉina kaj angla lingvoj, kaj kiuj estas portataj de unu tablo al la alia de asistantoj. Tuj poste, la dokumentoj estas kolektitaj por esti portataj al la superaj komandantoj de ambaŭ flankoj ke ili aldonu siajn subskribojn. Tiu-momento, kiel dum la tuta mateno, tondras pafiloj en malproksimo, la pafiloj kiuj ĉesos pafi laŭ la kontrakto post dek du horoj. La tuta aferspirita subskribado daŭras malpli ol 15 minutojn.

La ceremonio finiĝis. Granda paŝo estas farita al la paca solvo de la korea problemo. En fakto montriĝis, ke eĉ la plej akra konflikto povas esti intertraktata per firmdecida pacbatalo. La fakto montris, ke imperiista forto povas nenion atingi en la hodiaŭa mondo, ke la murdisto perforto, kiun la usonanoj en sia bandita lingvo nomis proprastile "Operacia Mortiganto" kaj "Operacia Strangolanto", povas nek mortigi nek strangoli popolojn defendantajn sian sendependecon kontraŭ agresado.

Por la nevenkebla korea popolo, nova epoko, kun novaj taskoj, jam komenciĝis,—la epoko por rekonstruado de ilia bela, militdetruita patrolando.

Ankaŭ por la popolo de la tuta mondo estas nova laboro por fari: certigi per senĉesa vigilanco kaj strebado por paco, ke nova militfajro, intencata de Singman Rhee kaj liaj subtenantoj, ne estu bruligita en Koreio; certigi ke la okazonta politika konferenco sukcesu kiel la armistika intertraktado; strebi por ke ĉiuj militominacantaj situacioj en ĉiu parto de la tero solviĝu per paca intertraktado.

La Flosanta Urbo sur la Perlo-rivero

La antaŭe malestimata boatpopolo nun havas siajn proprajn klinikojn kaj lernejojn kaj voĉon en la registaro

Ĉen Ĝuo-hŭa

La malgrandaj boatoj de la riverloĝantoj de Ĉinio dissemiĝas vaste, ĉefe laŭlonge de Jangze- kaj Perlo-riveroj kaj iliaj alfluo. Nekompleta nombrado de tiuj ĉi homoj, kiuj vivas laŭlitere flosantan vivon, montras, ke ili nombrigas pli ol 2,000,000, el kiuj pli ol 710,000 vivas en Kuangtung-provinco, laŭlonge de la Perlo- kaj Han-riveroj kaj la marbordo. En Kantono ili formas urbon sur la akvo.

Servante al siaj posedantoj kiel domoj kaj iloj por gajni vivrimedojn, la boatoj estas tiel diversspecaj kiel siaj funkcioj. Kelkaj, bele meblitaj, kun 4 kolonoj subtenantaj elegantan supran konstruaĵon, similas al flosantaj apartamentoj; tiuj ĉi estas la restoraci-boatoj. Estas boatoj por la loĝado; pramoj, ekskurso- kaj opero-boatoj; ĉerko- kaj rubo-boatoj; kaj arego da ŝarĝboatoj plenaj de legomoj, rizo, karbo aŭ diversaj komercaĵoj vendataj de kolportistoj.

Multaj fantaziplenaj rakontoj ekaperis por klarigi la originon de tiuj ĉi boathomoj—demonando nefacile solvebla, ĉar ili ne posedas skribitajn kronikojn. La plej popularaj “klarigoj” respegulis la malaltan pozicion, al kiu ili estis reduktitaj de la reganta klaso. Tiel oni supozis, ke ili devenis de la malestimataj Mjau- aŭ Jaŭ-minoritatoj. Ili estis malestime nomataj la “Dan Ĝja” (Ovo-tribo) pro la formo de iliaj boatoj.

La nuntempa riverpopolo estas fizike nedistingebla de la loĝantoj sur tero, kvankam kelkaj el iliaj kutimoj, precipe geedziĝ-kutimoj, estas tute malsamaj. Laŭ neskribita leĝo geedziĝoj estas kontraktataj inter najbaraj boatoj. Gejunuloj ĝenerale geedziĝas, kiam ili estas dekkelkjaraj; ofte knabinoj estas permesataj edziniĝi libere laŭ sia elekto; la knabino metas bukedon sur la antaŭaĵon de sia boato kaj kantas nokte amkantojn. La junulo en la plej proksima boato povas partopreni en la kantado kaj, se li estas akceptata, la geedziĝo okazas.

Geedziĝoj kun urb-loĝantoj estas malpermesataj, sed tiuj kun la sama familia nomo povas geedziĝi, kio estas malpermesata laŭ ordinara ĉina kutimo. Kiam la pli maljuna frato mortas, la pli juna frato edziĝas al la vidvino, dum, se ne estas pli juna frato, la vidvino estas libera reedziniĝi laŭ sia volo, kio estis malpermesata en malnova Ĉinio.

Kaŭze de la subpremo, al kiu la riverpopolo estis longe subigita, kaj la malfacilaĵoj kaj danĝeroj de la riverboata vivo, la riverloĝantaro multiĝis tre malrapide, kaj multaj el la viroj mortis junaj. La vidvinoj, kies nombro ege superas tiun de la viroj, tial havas neordinaran liberecon en edziniĝo kaj aliajn rajtojn.

Dum jarcentoj da feŭda regado la riverpopolo suferis plej multe pro la distingigaj

leĝoj. Dum Ming-dinastio imperia edikto malpermesis al ili vivi surborde aŭ aĉeti teron, kaj limigis ilian okupon al fiŝkaptado. Pli da reguloj estis faritaj dum Cing-dinastio; la riverhomoj ne estis permesataj lerni legi kaj skribi, porti ŝuojn, iri sur la ĉefaj stratoj; ili devis razi krucon sur siaj skalpoj kiel identigaĵon.

La promeso de pli bonaj tagoj, kiu venis kun la falo de Cing-dinastio en 1911, estis perfidita de Kuomintanga reĝimo, kiu alportis nur pli da mizero al la riverloĝantaro. La homoj de la urbo daŭrigis moki ilin kiel “Ovo-tribo” kaj “stultegulo”, kaj neniu el la boathomoj povis esperi fariĝi registara aŭ polica oficisto. Neniaj edukaj arandoj estis haveblaj por ili, tiel ke 85% de la viroj kaj 95% de la virinoj estis analfabetoj; tre malmultaj el iliaj infanoj iris al lernejo. La KMT-aŭtoritatoj limigis sian interrilaton kun la riverpopolo al la kolekto de kiel eble plej pezaj impostoj kaj al la konskriptado de kiel eble plej multaj viroj por la armeo.

Plej malbona estis la feŭd-bandmastra regado de doko, kies posedantoj trovis multe da manieroj por elpremi el la malestimataj riverhomoj. Ili estis devigataj pagi pezajn ankrantajn kostojn sub la minaco de severaj monpunoj fiksataj de la oficistoj, aŭ batadoj flanke de la fidungitoj de tiuj ĉi riverbordo-despotoj.

Hodiaŭ la rivero estas ŝanĝiginta. La ekspluatado fare de la dokposedantoj kaj la impostavidaj oficistoj finiĝis, la loĝantoj de la rivero estas liberaj vivi kie ajn ili volas; plenkreskuloj kaj infanoj sendiference ĝuas senpagan edukadon. La riverhomoj, hieraŭ malestimataj kaj subpremataj, hodiaŭ rektigis siajn dorsojn kaj laboras kiel unu homo por pli bona vivo.

Flosantaj hejmoj ĉe Kantono



La rapida disvolvigo de edukado por la riverpopolo dum la pasintaj tri jaroj estas en granda kontrasto kun la senefikaj klopodoj de privataj grupoj provizi edukadon por ili dum la KMT-tagoj. Pli ol 80 lernejoj estas starigitaj en la provinco por la riverpopolo, inkluzive 4 en la urbo Kantono, kiuj donas senpagan edukadon al ĉirkaŭ 2,000.

Unu el tiuj ĉi lernejoj estas konstruita proksime de Ŝamin-digo, kaj 458 lernantoj aĝantaj de 6 ĝis 32 jaroj lernas tie, dividitaj en matenan, posttagmezan kaj vesperan grupojn. La kursoj estas sur la sama nivelo kiel tiuj en la urbaj lernejoj, kaj la lernantoj lernas kun inteligenteco. La plejmulto venas al lernejo per boato, dum aliaj piediras laŭlonge de la riverbordo al siaj klasoj.

Flosantaj kultur-salonegoj ankaŭ estas starigitaj por servi la boatloĝantaron. La plej granda havas 7 filiojn distribuitajn inter la plej grandaj aroj da boatoj. Proksimume 400 homoj vizitas la ĉefan legoĉambron ĉiutage.

Sanlaboro estas energie efektivigita inter la riverloĝantaro, kiu, rezulte de pasintaj malriĉeco kaj nescio pri higieno, suferas de trahemo, disenterio kaj aliaj malsanoj. En la pasinteco estis kutimo en okazo de malsano konsulti la "sorĉistinojn", kiuj, vivante kiel diinoj sur siaj boatoj, bone vestitaj kaj nutritaj, kutimis konsili al la suferantoj bruligi monpaperon* por forpeli la malbonajn spiritojn.

Hodiaŭ estas kliniko kun filioj supre kaj malsupre de la rivero, kaj, pro la registara higien-eduka laboro, la riverpopolo lernis iom pri la scienca kuracado de

malsanoj. Medicina scienco forpelis la "sorĉistinojn" de la boatoj por ĉiam.

La registaro ankaŭ kuraĝigis la riverloĝantojn partopreni en politika agado, antaŭe senrajtigataj, ili nun rajtas esprimi opiniojn pri siaj propraj aferoj. Ili entuziasme sin ĵetis en la lukton kontraŭ siaj feŭdaj ĉefoj, helpis konservi ordon laŭlonge de la rivero, kaj partoprenis en la liberigo de Hajnan-insulo frue en 1950. Ankaŭ ili elektis siajn proprajn reprezentantojn por ĉeesti la municipalan konferencon de popolaj reprezentantoj.

La riverpopolo ankaŭ komencis partopreni en la agado de sindikatoj. El la pli ol 6,100 membroj de la Marista Sindikato duono estas el la riverpopolo, kaj 3,700 aliĝis al la Doklaborista Sindikato kaj Transportista Sindikato, kiuj kune nombras 25,000 membrojn.

Multe estas plenumita en mallonga tempo por doni al la riverloĝantaro de ŝancon gajni decajn vivrimedojn, ricevi edukadon, kaj vivi sanan vivon. Tio estas granda kontrasto kompare kun la malbonon-fara politiko de la KMT-reĝimo. La registaro gajnis iliajn korojn, kaj unuiĝinte ili laboras por plibonigi sian vivon kaj plenumi sian rolon en la konstruado de nova Ĉinio.

* Papero en formo de moneroj aŭ monbiletoj.

Kurantaj Aferoj

Mongol-lingva Lernejo Starigita

Mongol-lingva Lernejo estas starigita en Gŭejsŭej, sidloko de la Aŭtonoma Registaro de Interna Mongolio, la 7an de julio.

La unua grupo konsistanta el 82 mongoloj de ambaŭ seksoj nun studas en la nova lernejo kies programo inkluzivas filologion kaj tradukon. Ili antaŭe estis laborantoj de la aŭtonoma registaro kaj iam ricevis mezgradan edukon.

La Nova Haveno Tanggu Kapablas Enigi 10,000-tunajn Ŝipojn

Dekmil-tunaj oceanaj vaporŝipoj kun enakviĝo de 27 futoj povas sekure sin ŝarĝi aŭ deŝarĝi en la nova haveno de Tanggu, proksime de Tienzino, en la tempdaŭro inter julio kaj novembro ĉijare, kiam la tajdoakvo restas du kaj duona metrojn alta.

La nuna profundeco de la navegebla vojo en la nova haveno ĝenerale superas ses kaj duonan metrojn, kaj la profundeco ĉe la ankrejo atingas ok kaj duonan metrojn. De nun la profundeco de akvo konstante restos je la sama nivelo kiu faras la enveturadon de ŝipoj en la havenon tute praktikebla.

En vintro kiam la tajdoakvo malaltigas, oni ĝustatempe anoncos la profundecon de la navegebla vojo kaj la grandecon de la ŝipoj kiuj povas sekure eniri la havenon.

Nova Granda Distrejo por Laboristoj en Ŝenjang

Nova laborista distrocentro, kiu povas per unu fojo enlasi pli ol 20,000 personojn, estis establita de la Komunuma Sindikata Federacio antaŭ nelonge en la industria regiono de la urbo Ŝenjang (Mukdeno).

En du grandaj haloj troviĝas ĉiuj specoj de distraĵoj, kiaj bilardoj, pinpono, ŝakludoj ktp. La centro ankaŭ enhavas legoĉambrojn por plenaĝuloj kaj infanoj, librovendejon, vendejon de malvarmaj trinkaĵoj kaj liberĉielan teatron. Ankoraŭ aliaj sportaj instalaĵoj estos aldonitaj en la baldaŭa estonteco.



Boatistino de la riverpopolo

La Arttrezoro de Bingling-templo

Jang Joŭ

Kangsu-provinco en Nordokcidenta Ĉinio estas provinco kun famaj galerioj. La jam de longe bone konataj Tunhuang-kavernoj situas ĉe la okcidenta fino de la koridoro okcidente de la Flava Rivero en ĉi tiu provinco; la tieaj kelkcent kavernoj estas plenaj de belegaj freskoj kaj skulptaĵoj, kiuj estas tre riĉa artheredaĵo de Ĉinio. Kaj nun, en Jungĝing-gubernio de la sama provinco, en la Malgranda Ĝiŝi-monto sur la norda bordo de la Flava Rivero, oni trovis alian kavernaron, alian grandan arttrezorejon, kiu estis kaŝita inter la altaj montoj kaj profundaj valoj dum pli ol mil jaroj.

En ĉi tiu granda trezorejo konserviĝas pli ol kvarcent el roko skulptitaj budastatuoj kaj multaj freskoj kun elegantaj, atikaj desegnoj, kiuj ĉiuj estas same belaj kiel tiuj de la Tunhuang-kavernoj. El la vasta, Nordokcidenta montaro, tiu ĉi trezoro disjetas brilegajn lumradiojn. Sed de la antikva epoko ĝis la Ĉing-dinastio (1644-1911 p. K.), oni nur venadis ĉi tien por fari oferojn al budaĵoj kaj peti de ili benojn. Ĝiaj abundaj historiaj interesaĵoj kaj artaj valoroj estas malkovritaj kaj alte taksitaj nur lastatempe kiam la popolo fariĝis mastro de sia propra lando.

Sub la gvido de la Ministerio de Kulturo, dek kelkaj artistoj kaj arkeologoj sin organizis en esploran grupon. Ĝaŭ Ŭang-jun, estro de la Buroo pri Kulturaĵoj en la Nordokcidento, fariĝis grupestro, dum U Zo-ĵen, dekanato de la Centra Arta Akademio, kaj Ĉang Ŝu-hung, estro de la Instituto de Esploro pri la Kulturaĵoj de Tunhuang, fariĝis vicgrupestroj. Ili ĉiuj estas famaj pentristoj de Ĉinio. En septembro, 1952, ili komencis sian tre malfacilan vojaĝon kaj laboron.

La gubernia urbo Jungĝing estas konsistigita de montoj similaj al sennombraj petaloj de granda lotusfloro. Ĝi estas mirinda pejzaĝo de la naturo. Kvankam iam ĝi estis grava loko por komunikado, tamen nun tie troviĝas jam nenia vojo por atingi la kavernojn. Transpasinte la Flavan Riveron, la esplora grupo supreniris altajn montojn per ĉevaloj ĝis mallarĝa interkrutejo kie ili deĉevaliĝis kaj antaŭeniris piede. Subite antaŭ iliaj okuloj ekprezentiĝis bela, majesta vidaĵo—grizverdaj krutaĵoj plene inkrustitaj per kavernoj kaj ĉe la monttalo staras grandega ŝtona budastatuo.

La historie fama Bingling-templo estas ĉi tie. La templo estas dividita en du partojn: la Supra Templo kaj la Suba Templo. La Supra Templo havas nur du ĉefajn kavernojn. De tie paŝu du kilometrojn pli laŭlonge de la valo, kaj vi atingos la Suban Templon kiu estis senkompare prospera loko en la Ŭej-dinastio (386-534 p. K.) kaj Tang-dinastio (618-907 p. K.). Sed nun restas nenio el la antikva templo krom kaduka budaisma kapelo. De la postsignoj sur la kavernoj kaj de la malnova pentraĵo "Panoramo de Bingling-templo" retrovita de la esplora grupo, oni povas rimarki ke en antikva tempo sin trovis ĉi tie ne nur

pompaj konstruaĵoj, sed la kavernoj ankaŭ havis solivojn kaj koridorojn, dum tri transflugantaj pontoj* paralele kuris orienten, preterpasante pli ol ducent kavernojn. Sed ĉio ĉi tio estas detruita en kelkaj militoj. Hodiaŭ nur antaŭ iu kaverno ankoraŭ postlasigas lignaj balustroj, kaj krome nenio estas trovebla plu.

Kiam la esplora grupo apogigis dek kelkajn metrojn longan ŝtupetaron sur krutaĵojn, kaj grimpis ĝis malfacile atingeblaj kavernoj, ili trovis la plej frue surroko ĉizitan daton—la dua jaro de Jenĉang de la Norda Ŭej-dinastio (513 p. K.). Tamen oni povas aserti ke ĉi tiu kaverno de la Ŭej-dinastio ne estas la unue konstruita kaverno. Laŭ dokumentoj skribitaj en la unuaj jaroj de la Tang-dinastio, oni fondis kavernojn ĉi tie tiel frue kiel en la unua jaro de Tajŝi de Ĉin-dinastio (265 p. K.). Unuvorte, la fakto ke malgraŭ historiaj ŝanĝoj kaj la erozio de ventblovado, sunumado, pluvado kaj neĝado dum la pasintaj mil kaj kelkcent jaroj, ĉi tiu arttrezoro estas konservita ĝis hodiaŭ, plene manifestas la grandecon de la historio kaj kulturo de Ĉinio kaj la saĝecon de la ĉina laboranta popolo.

En la kavernoj de Tang-dinastio, la esplora grupo eltrovis iom da ŝtontabuloj kun malgrandaj ideografoj, el kiuj oni povas rimarki la prosperan staton de budaismaj temploj en tiu dinastio. La tiama reganta klaso kredis je budaismo. Ili konstruis templojn kaj kavernojn ĉi tie por ke ili povu iri al la Okcidenta Plej Ĝoja Lando** post sia morto. Dum la esplorado oni trovis nenium kavernon de Sung-dinastio (960-1279 p. K.), sed ŝtontabulojn kaj kavernojn de Ming-dinastio (1368-1644 p. K.) en kiuj oni vidis repenitajn freskojn de Sung- kaj Ĵuan-dinastioj.

La ĉefa valoro de ĉi tiu kavernaro kuŝas en ĝia arto de skulptado. Eĉ inter ĉiuj postlasaĵoj de la budaisma arto de la tuta lando, ĝi ankaŭ okupas specialan lokon. El la belaj, delikataj figuroj de budaĵoj, mesofarantoj kaj bodisativoj en la kavernoj de Ŭej-dinastio, oni povas vidi la unikan stilon de Ŭej-dinastio—ĝia pure nacia formo, ĝia rigora spirito kaj ĝiaj firmaj kaj vivecaj strekoj. Ĉi tiajn strekojn ni povis trovi antaŭe nur en la sola postlasita pentraĵo de la granda pentristo Gu Kaj-ĝi de Ĉin-dinastio. Sed ĉi tiu kavernaro liveras al ni multajn skulptaĵojn kun Ŭej- kaj Ĉin-tradicioj. En la supre menciita Ŭej-kaverno kiu estis fondita en 513 p. K., la statuo de la bodisativo Venŝu, sidanta norde inter tiuj de du aliaj bodisativoj en ambaŭflankaj muroj de la kaverno, estas verko en stilo de majesteco sed ankaŭ vigleco, pompeco kaj samtempe simpleco. El ĉi tiu statuo en senmova pozo manifestiĝas spontanee "viveca spirito." Ĝi estas ja ĉefverko kies stilo estas apenaŭ trovebla ĉe la verkoj post Ŭej-dinastio.

La skulptaĵoj en la Tang-kavernoj elmontras ke la skulpta arto de budaismo en Ĉinio, post la disvolvigo



Avalokitesvaro el Tang-dinastio (Niĉo N-ro 51)

dum la antaŭaj Ses Dinastioj, jam tiam atingis sian kulminon en originala verkado. La historio de Ŭej ĝis Tang estis transpaso de tumulta, malpaca epoko en abundan, stabilan epokon. Ĉi tiu periodo de historio speguliĝas en arto en tio ke la formo de krudeco ŝanĝiĝis en tiun de gusto, riĉeco kaj matura majstrecio. La korpulenta, bela busto de Avalokitesvaro montras al ni la subtilan ĝis la plej malgranda nuanco realisman stilon de la statu-skulpta arto de Tang-dinastio. En iu kaverno de Tang-dinastio, la plej granda el ĉiuj kavernoj tieaj, aro da statuoj estis skulptita el la rokaj muroj. La grandaj budastatuoj estas sep-ok futojn altaj. Iliaj grandioza kaj vigora stilo kaj fortoplana spirito estas ja mirindaj. Ĉi tiuj ŝtonstatuoj de Tang-dinastio montras ke la Kendora artformo de Hindio enportita en Ĉinion kun budaismo jam kunfandiĝis kun la propra nacia artformo de Ĉinio.

La freskoj en ĉi tiu kavernaro estas plejparte repentitaj en Ming-dinastio. La enhavo estas ĉefe pri mandaro, la esotera doktrino de mahajana budaismo. La stiloj de la budaismaj rakontoj, mesofarantoj kaj desegnoj sur la plafonoj ĉi tie estas diferencaj de tiuj de la freskoj de Sung- kaj Jŭan-dinastioj en Tunhuang kaj ankaŭ malsamaj ol tiuj de la pentraĵoj enportitaj lastatempe el Tibeto. En iu pentraĵo pri metempsikoza, oni povas vidi la dikajn liniojn kaj pasian kolorigon. Ĉi tio estas la karakterizaĵo de la freskoj de Ming-dinastio en la Bingling-templo. Ĝi ankaŭ povas kompletigi la arttrezoron de Tunhuang kaj pliriĉe ilustri la historion de freskoj depost la Jŭan-dinastio.

La Malgranda Ĝiŝi-monto estas mirinda pejzaĝo de nia granda patrio kaj la Bingling-templo nia altvalora kaverna arttrezoro. Loko posedanta samtempe kulturaĵojn kaj belan pejzaĝon estas malofta. Ĝi povas

fariĝi turisma kaj ripoza ejo en la estonteco, sed ne la nuntempa. En la popola lando, la laboro en la kampo de kultur-esploro kaj belarta arkeologio laŭplane paŝos ankoraŭ pluen. En ĉi tiu somero alia esplora grupo estos ekspedita al alia kavernaro en Kangsu-provinco, la kavernaro en Majĝi-monto. Situante sudoriente de Tjenŝuj, ĝi estas alia granda arttrezorejo, kiu estis konata kiel "loko kun plej pitoreska pejzaĝo" jam en Han-dinastio (206 a. K.—220 p. K.). La tiea trezoro eble superas tiun de Bingling-templo.

Komprenoble en popola Ĉinio, eminentaj tradicioj de popola arto estas respektataj, ĉar Prezidanto Maŭ diris, "Priesplori la vojon de la disvolviĝo de antikva kulturo, forigi ĝiajn feŭdismajn rekrementojn kaj eltiri ĝiajn demokratiajn esencojn estas la necesaj kondiĉoj por disvolvi novan nacian kulturon kaj plialtigi nacian memfidon." La artistoj de nova Ĉinio estas plenumantaj ĉi tiun indikon.

** Lignaj pontoj, longaj aŭ mallongaj, interligantaj mont-krutaĵojn.*

*** La paradizo, laŭ budaistoj.*

Kunlaboru Tutmondaj Esperantistoj!

Traduko, represo, resumo kaj ĉiumanieraj utiligoj de materialoj en nia bulteno estas permesataj kaj dezirataj kondiĉe ke ili estos fidele reprezentataj kaj la utiliginto plenumos niajn jenajn petojn:

1) Sendi al ni 2 ekzemplerojn de la traduko, represo aŭ resumo kaj sur ili noti el kiu numero kaj kiu artikolo ĝi estas tradukita ktp.

2) Sciigi al ni kia estas la ĵurnalo aŭ gazeto, sur kiu aperis la traduko, represo, aŭ resumo kaj, se eble, kiom da legantoj ĝi posedas.

Por faciligi tiuflankan kunlaboron, ni estas pretaj laŭeble helpi la kunlaborantojn per aliaj materialoj pri popola Ĉinio, se ili tion petos. Al ĉiu utiliginto de nia materialo ni sendos malgrandan donacon kiel bildkartojn, libron ktp.

Ĉiuj veraj pacamantoj nepre klopodadu por pli bona interkompreno inter la diverslandaj popoloj por ke ili efike laboru por longdaŭra paco.

—La Redakcio

Kiam Finiĝos Malfeliĉaj Tagoj Tiaj

(Popolkanto de la Mjaŭ-nacio)

La montaj floroj ne plu floras,
Ĉar malmorale regas sur la mondo.
La Ĉjang-klikanoj rabis de ni la domaĉon,
Bambuan budon ni starigas sur la monto.
Ni, mjaŭ-oj, kiel hirund' forkvosta,
Ja novan neston rekonstrui
Devas en ĉiu jaro posta.
Kie la kampoj? Kaj kie la tero?
Sur la deklivoj kaj en la rok fendoj
Colon post colo ni elfosas propramane.
La korp' kurbigas kiel arko
Kaj ŝvitoj fluas vaporbane.
El niaj larm' kaj sango
Finfine ion ni rikoltas.
Sed rabe ĝin forportas
La Ĉjang-klikanoj.
Kiel montfontoj ŝprucas nia larmo
Kaj de la *huluŝeng'* velkiĝis muzikĉarmo.
Sub nigra mont' kurbigas dorsoj niaj.
Ve! Ĉu finiĝos malfeliĉaj tagoj tiaj?

Sopiro al la Ruĝa Armeo

(Tibeta popolkanto)

Antaŭ pli ol dek jaroj
Foje ĉi tie stelo brilis.¹
Sed poste ĝi foriris.
Ĝin tage-nokte ni sopiris,
Blankiĝis niaj haroj
Kaj nebuliĝis la okuloj.
Naskiĝis kaj plenkreskis ŝafgeneracioj.
Ho! kiomfoje falis kaj refloris peonioj.
Kaj kiomfoje neĝis sur la montgiganto!
Hodiaŭ vi revenas fine,
Ruĝa Arme', nia savanto!

Tibeto Estas Nun Liberigita

(Tibeta popolkanto)

Leviĝas la belega suno,
Kies radioj, kiel oraj sagoj,
Prilumas la Neĝmonton kun majesto.
Aperas la leono, reĝo de la monto,
Kaj brilas ĝia korp' en gema vesto.
Aperas la kolomboj de l' montaro,
Kies flugiloj etendiĝas kiel nuboj mult-
koloraj.
Alflugas aglo granda.
Flankiĝu rokoj de l' Neĝmonto

Kaj donu spacon al la flugiloj muskolaj!
Flankiĝu, vi arbaroj,
Ĉar mankas loko al nia dancrondo.
Ni dancas gajan dancon.
Kaj vekas la bovaron sur la stepa vasto.
Ni kantas gajan kanton
Kaj ehas la montar' de neĝa ĉasto.
Tibeto estas nun liberigita
Kaj longe vivos la PLA-anoj kaj ni
tibetanoj kiel astro.

Ni Vidas la Belan Pinton de la Korala Pagodo

(Tibeta popolkanto)

Vi, protektanto de la temploj,
Gvidanto al la feliĉa futuro,
Popola Liberiga Armeo,
Estas pli bona ol la ĉielulo!
Ni vidas jam tra l' blanka nubvual'
La belan pinton de l' pagodo el koral'!²
Kiel flugantaj sagoj,
En viaj spuroj
Galopas ni surdorse de ĉeval' rapida—
Jen la ĉiela limo jam sub la okuloj!

¹ Muzika instrumento de la mjaŭ-nacio.

² En 1935, kiam la Laborista-kam-parana Ruĝa Armeo sub la gvidado de la Ĉina Kompartio faris ekspedicion al Norda Ĉinio por rezisti la japanan invadon, ĝi pasis tra la tibetana regiono de Sikang-provinco.

³ Pinto de la korala turo: simbolo de feliĉo.



Al Ĉasado

Papertranĉaĵo de Ĉi Ŭej

La Ŝtalfaristo

(daŭrigo)

Ĉen Mjau

III

Iun tagon kiam la laborvico estis baldaŭ finiĝonta, Majstro Sun foriris por partopreni kunvenon, la unua kaj dua asistantoj ankaŭ forestis okupigante pri io alia; Bej-ŝeng sola zorgis pri la fornego. Jen li surmetis la nigrajn okulvitrojn kaj rigardis en la fornegan aperturon, jen li staris tie apud ĝi meditante pri io. Lia mieno malhelis. Li ankoraŭ pensis pri la interparolado en la branĉo de Novdemokratia Junula Ligo en la tagmezo. Li sentis sin jam taŭga por esti junulara ligano. Ankaŭ la branĉa sekretario rekonis lian rapidan progreson, sed li aldonis ke lia progreso estas ankoraŭ ne sufiĉa; li devas lerni humile de la kamaradoj. Tiu esperis ke li ankoraŭ hardu sin dum ioma tempo. Bej-ŝeng konsentis siatempe, sed ne sciis kial li maltrankvilas kvazaŭ io pezus sur la koro.

Ĝuste en tiu momento la Fabrikestro alpaŝis kun nigraj okulvitroj en la mano, rigardis en la fornegojn kaj turnis sin al Bej-ŝeng: "Rigardu, ĉe la elŝpruciga aperturo iu briko difektiĝis, tuj riparu! alie la gaso ne povos bone bruli." Bej-ŝeng diris jes, kaj la Fabrikestro iris pluen. Post mallonga tempo venis la anstataŭantoj kaj Bej-ŝeng transdonis la taskon al la anstataŭanta teamo. Kaj poste tria teamo anstataŭis la duan.

La Fabrikestro denove alvenis tuj je la komenco de lia laborvico en la sekvanta tago. Tiu kliniĝis por enrigardi kaj vidis ke la briko ĉe la elŝpruciga aperturo ne nur ne estas riparita, sed la truo eĉ pligrandiĝis. Li tiris Bej-ŝeng al si: "Ĉu vi vidas?" La voĉo sonis malmilda. Bej-ŝeng rigardis en la fornegojn, vidis, ke la afero ne iras en la ĝusta vojo kaj sentis iom da maltrankvilo, sed li diris nenion. La Fabrikestro demandis: "Kial ĝi ankoraŭ ne estas riparita?" Rimar-

kante ke la Fabrikestro evidente lin kulpigis, Bej-ŝeng respondis sin pravigante: "Hieraŭ mi estis anstataŭita tuj post ol vi donis al mi la taskon. Mi transdonis ĝin al teamo B. Ili ne riparis. Ĉu tio estas mia kulpo?" Ordinare la Fabrikestro parolis tre afable, sed tiutempe trovinte la respondon de Bej-ŝeng iom pikanta, li intence diris pli severe: "Mi donis la taskon al vi, do vi devas respondi pri la sekvo. Se ili ne plenumis la komision, estas via devo demandi de ili klarigon; se vi ne plenumis mian ordonon, la respondeco falas sur vin!"

Bej-ŝeng sentis doloron en la koro kvazaŭ io tordiĝis tie. Kiam la Fabrikestro foriris, li tuj venigis laboristojn kaj faris riparon al la difektita briko ĉe la elŝpruciga aperturo.

Tiuvespere, kuŝante en la lito, Bej-ŝeng ju pli forte fermis siajn okulojn, kvazaŭ iu alia okulo sur lia frunto malfermis sin des pli larĝe. Li neniel povis endormiĝi. Lia penso vagadis zigzage kiel sovaĝa ĉevalo kaj la travivaĵoj de la tuta jaro depost lia eniro en la uzinon pasis laŭvice antaŭ liaj spirantaj okuloj... En tiu momento li ekkomprenis kial la sekretario de la junul-liga branĉo diris al li, ke li lernu humile de la kamaradoj kaj sin bone hardu.

Matene, Majstro Sun apenaŭ ellitiĝis, kiam li vidis ke Bej-ŝeng alkuris spiregante. Tuj post eniro li diris: "Majstro Sun, mi faris grandan eraron hieraŭ." Tio surprizis Majstron Sun. Provante reakiri sian spiron, Bej-ŝeng rakontis kiel li parolis maldece kontraŭ la Fabrikestro.

"Sidiĝu! Mi ĵus volis paroli kun vi," diris Majstro Sun. Bej-ŝeng sidiĝis sur la randon de la seĝo kaj ŝajnis tre maltrankvila ankoraŭ.

Majstro Sun forlasis sian terliton, sidiĝis sur seĝon kontraŭ Bej-ŝeng kaj diris: "Ĉu ni laboristoj, laŭ via scio, iam partoprenis en la regado de la ŝtato? Nun nia revolucio fine triumfis sub la gvidado de Prezidanto Maŭ. Kaj de tiu ĉi ŝtato, tiu ĉi uzino kaj tiu ĉi fornego nro. 5 vi havas ĉiam vian parton, ĉu vi ne scias?...". Majstro Sun parolis pli kaj pli laŭte kvazaŭ li forgesus sin mem, dum lia edzino maltrankviliĝis apude.


Bej-ŝeng rigardis al la vizaĝo de Majstro Sun, en lia cerbo multegaj konfuzaj impresoj alnaĝis kvazaŭ li povus legi sur lia vizaĝo la suferojn kiujn li travivis antaŭe. Li estis ektuŝita malgraŭvole kaj varma fluo trakuris la palpebrojn kaj vualis la okulojn.

Nur tiam Majstro Sun paŭzetis kaj poste aldonis: "Eble mi estas tro malindulga..."



Demokrata diskutado

de Ŝi Lu



Bej-ŝeng en streĉa direktado

Bej-ŝeng tuj levis sian kapon kaj diris: "Ne, Majstro Sun, ĉion vi diris prave!"

Du grandaj larmogutoj falis sur lian bruston kiel rospertoj.

IV

En la pasinta aŭtuno, la unua helpanto estis translokita al alia forno kaj Bej-ŝeng promociita al la ofico de dua helpanto. Tiam Majstro Sun donis al li novan lecionon.

Iun tagon dum la produktado de mola ŝtalo, Majstro Sun diris: "Hodiaŭ mi komisiis al vi, Bej-ŝeng, tiun ĉi fornego da ŝtalo. Ĉu ĝi prosperos aŭ ne, vi sola respondos pri la sekvo." Poste li turnis sin al la laboristoj: "Hodiaŭ la vortoj de Bej-ŝeng estas ordonoj kaj vi ĉiuj obeu liajn direktojn!" Tiam li sidigis ĉe la flanko kaj rigardis silente.

Bej-ŝeng sentis kvazaŭ milkilogramo ŝarĝo pezus sur lia korpo. Li kolektis siajn senordajn pensojn kaj faris fortostreĉon por ĝin porti. Similante al formiko sur varmego kaldrono, li, kun nigraj okulvitroj en la mano, rigardis tien kaj reen. Kiam oni devas aldoni karbonon? Kaj kiom? La laborojn ĉiutagajn, kiujn li plenumis kutime, li kvazaŭ forgesus kiel fari. Konsiderante, kalkulante, li estis tiel okupita kaj ekscitita, ke ŝvitperloj falis pluve de sur lia frunto kaj la velŝtofa bluzo estis trae malsekigita. Kiam li turnis sian rigardon al Majstro Sun, li trovis lin sidanta tie silente kun agrabla rideto. Li direktis la laboristojn aldoni materialon, ekzamenis la specimenojn kaj enmetis manganferon. Post mallonga tempo eksonoris la signala sonorilo por ellasi ŝtalon. La sonora kvazaŭ frapus ĝuste sur lian koron. La unua forno da ŝtalo, pri kiu li sola respondis de la komenco ĝis la fino, estis baldaŭ produktota. Io muĝis en la koro kvazaŭ lokomotivo enstrudiĝus tien. Kiam kliniĝis la fornego, la likva

ŝtalo fluis rapide en la grandan ujon biel senbrida mont-torento. La brile blanka ŝtalfluo disŝprucigis milojn da oraj, flavaj kaj ruĝaj fajreroj kaj lumigis la tutan laborejon. En la vasta fajrolumo oni vidis de malproksime nigran silueton: tiu estis Bej-ŝeng, kiu direktis streĉite la ellason de la ŝtalo.

La ŝtalo estis produktita. Laŭ laboratoria provo ĝi estis tute laŭnorma. Kim juna laboristo kurante portis al ili la ĝojigan novaĵon, ĉiuj kriis kaj saltis tiel gaje kiel en la tempo, kiam la rekonstruita uzino produktis sian unuan fornego da ŝtalo. Nur tiam Bej-ŝeng faris longan elspiron, kvazaŭ li forĵetus per ĝi la milkilogramo ŝarĝon kaj fariĝis tiel malpeza, ke li jam ŝvebus en la aero. Sed kiam la kamaradoj venis lin gratuli, li, forviŝante la ŝviton, eksurpriziĝis kvazaŭ li stumblis kontraŭ io kaj eksingardemis. Majstro Sun alpaŝis de post la ĉirkaŭstarantoj. En liaj okuloj, ĉe liaj buŝanguloj aŭ sur lia vizaĝo neniam radiis tia ĝojo. Li diris kun rida voĉo: "Bej-ŝeng, la ŝtalo estas produktita!" Bej-ŝeng fiksas sian rigardon al li kaj dum longe ne sciis kiel respondi, poste li diris al Majstro Sun per mallaŭta, sed grava tono: "Estas facile rigardi flankestante sed malfacile preni sur sin mem la taskon. Tiu ĉi mia forno da ŝtalo estas ankoraŭ malproksime de plena sukceso!" Aŭdinte tiujn vortojn, Majstro Sun eksplodis

per gaja rido.

En la printempo de la kuranta jaro, kiam Ŝang Bej-ŝeng estis ĵus akceptita de la Junula Ligo, la supera instanco instrukiis sendi certan nombron da bonaj junaj laboristoj al la teknikaj institutoj por eduki ilin en novtipajn specialistojn. Sur la nomlisto de la elektitoj la Fabrikestro skribis "Ŝang Bej-ŝeng".

EL POPOLA ĈINIO

Monata Informa Bulteno Eldonata de Fremdlingva Eldonejo

Redakcio: 26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio
Administracio: 38 Suchow Hutung, Peking, Ĉinio

KVARA JARO N-RO 8

ENHAVO

La Triumfo de Intertraktado

Transiro de Uĝjang-rivero

Al la Plej Bezonaj Postenoj

Mi Ĉiam Restos al Vi Kiel Antaŭe

Senpaga Medicina Servo por Milianoj

Meng Taj


Grandskala Konstruado de Elektra Industrio en 1953

La Flosanta Urbo sur la Perlo-rivero

La Arttrezoro de Bingling-templo

La Ŝtalfaristo

La Restoracio Leono



Papertranĉaĵo de Nuej Ŝing-nung, kamparano de Jiŝing - gubernio, Kiangsi-provinco

Papero - tranĉado estas popola arto ŝatata de diverslokaj laborantaj popolanoj tra Ĉinio. Sur la fenestroj aŭ muroj de kamparanaj domoj oni ofte povas vidi tiajn ornamaĵojn de granda artvaloro. La plej lertaj tranĉistoj povas tute laŭvole kaj originale tondi, senhelpe de skizoj sur la papero, diversajn belajn desegnojn, florojn, bestojn, rakontobildojn, k. a. Por produkti plurajn kopiojn samtempe, oni stapligas kvanton da paperfolioj kaj tranĉas laŭ la projekto per speciala tranĉileto. Tian laboron oni nomas papero-gravurado. La specimeno kiun ni aperigis ĉi tie, ĉerpis sian temon el *Ĉiuj Estas Fratoj*, granda ĉina novelo de la 14-a jarcento (verkita de Ŝi Naj-an). Ĝi prezentas la scenon kiel U Sung "kreas grandan haoson" en la Restoracio Leono. U Sung, la famekonata heroo kiu iam pugnomortigis tigron, estas forjetinta sian malamikon el la alta pavilono de la Restoracio. Supre dekstre en la bildo estas U Sung, kiu kolere rigardas kun levitaj pugnoj. Tiu kiu estas falanta de supre estas Ŝjimen Ĉjing, la malvirta kanajlo, kiu perfortis lian bofratinon kaj venenis lian fraton. Tiu ĉi rakonto, kiu spegulas la sukcesan luktadon kontraŭ la subpremo de la feŭdisma potenco, havas vastan diskonatecon inter la ĉina popolo.

—La Red.